

Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 584-5 (7-8) JUL.-AŬG. 1954



La nova Aŭstra Esperanto-poŝtmarko

Centro de Esploro kaj Dokumentado	..	..	..	..	..	207
Enigma Konkurso	..	..	..	..	..	218
Esperantista Vivo	..	..	..	..	..	199
Internacia Konkurso 1954	..	..	..	..	..	208
Nia Forumo ..	..	..	..	..	..	211
Oficiala Informilo	..	..	..	..	..	223
Radio kaj Esperanto	..	..	..	..	..	222
Tra la Librero	..	..	..	..	..	210
Tra la Mondo Esperantista	..	..	..	..	..	197

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 584-5

Jul.-Aŭg. 1954



 *50 - jara jubileo* 
de l' Aŭstra Esperanto - Movado

NI vivas en jubilea epoko : signo de maljuniĝo de movado kaj de homoj. Aro da konataj kaj nekonataj samideanoj povis festi 50-jaran partoprenon en la movado—bela ekzemplo pri fideleco kaj konstanteco. La 50-jara datreveno de la apero de nia lingvo (1887–1937) okazis dum premiga tempo, kaj en la kongreso en Varsovio jam sentiĝis io katastrofa. La katastrofo venis, sed Esperanto trapasis ĉion ! Kie ĝi malaperis ĝi releviĝis kiel fenikso el cindro, pruvante ke bona ideo kaj ĝia realigo ne malaperos. Unu el la landoj kie nia movado estis perforte nuligita, estis Aŭstrujo. Pri ĝi temas la nunaj linioj, ĉar estas duonjarcento post apero de la unuaj apostoloj de Esperanto en tiu ĉi regno, la iama Hapsburga Monarkio.

Doktoro Zamenhof studis en Vieno, centro intelektula kaj ĉefurbo de multlingva imperio. Ni scias, ke tiu ĉi multlingveco kun supereco de unu idioma super alia en diversaj sferoj, spertita de li en du regnoj, la rusa kaj la aŭstra, fortigis en li la ideon de supernacia helpilo. Sed li vidis pli optimisme, li atendis kaj esperis ke

interne de tiaj multlingvaj regnoj servu la supernacia idioma de li kreita. La estinta Aŭstrujo-Hungarlando, komplika organismo ŝtatjura, tamen prezentis eblecojn de parta realigo de la origina ideo de D-ro Zamenhof. La sorto volis alie, disfalis pluraj regnoj kaj la kondiĉoj lingvaj estas nun funde aliaj.

Se ni dediĉas hodiaŭ tiun-ĉi tekston al la jubileo de la Esperanto-movado en Aŭstrujo, ĝi estas pli ol esprimo de danko al niaj pioniroj en la (germanlingva) parto de la estinta monarkio. Ĝi estas scio pri la grava rolo kiun ludis, ludas kaj ludos tiu-ĉi lando kaj speciale Vieno.

La Esperanto-movado en Aŭstrujo estas markata per kvar datoj : 1904, 1918, 1938 kaj 1945, la komenco, la disrompo de politika kaj ekonomia unueco, la anekso al la Tria Regno kaj kun ĝi la tuta sekvo kiun ni spertis, kaj laste la rekomenco en 1945. Spite ĉion, la movado releviĝis, pene sed persiste ; kaj kio gravas unue, la apogo de la Registaro estas efektiva, ne nur rezolucia.

La unuaj pioniroj ne plu vivas. La pli granda parto de nunaj aktivaj

Esperantistoj aliĝis post 1918, kaj eĉ ilia nombro grave falis pro la teruraj premoj kiujn suferis la lando. La Honora Tabulo de la unuaj pioniroj montras la nomojn

Johann Schröder

Otto Simon

Alfred H. Fried

Ĉiu el la tri distingitaj apartenis al alia medio socia sed ĉiuj agis en unu direkto por akceptigi la ideon de internacia lingvo, kiu servos al ĉiuj. Schröder, redaktoro de *Neuigkeitsweltblatt*; Simon, profesoro en la Komerca Akademio en Vieno; kaj Fried, la fama verkisto kaj pacifisto (Nomen atque Omen!) ricevinta por sia porpaca agado la Nobelpremion; ankaŭ ĉirkaŭ ili aro da kunhelpantoj modestaj, fidelaj, konvinkitaj pri la boneco de la afero. Apartenas al pli kompetenta verkanto la tasko skribi la historion de la movado en Aŭstrujo kaj tiri el la forgeso la nomojn de la aktivuloj de la unua epoko.

La dua periodo entenas la jarojn 1918–1938, jaroj gravuritaj en la memoron de ĉiuj, kiuj ilin devis travivi. Du kongresoj, 1924 kaj 1936, teknika konferenco en 1934, kaj manifestacioj okazis sub cirkonstancoj neniel favoraj por nia ideo. Tamen la optimismo esperantista sciis eltiri maksimumon kaj starigi la movadon sur bona grundo.

Nenie nia movado renkontis tiel favoran konsideron kaj atenton kiel en tiu-ĉi lando, esprimitan en la apogo de nia afero en interŝtataj traktadoj pri Esperanto (Ligo de Nacioj, UNO, UNESKO), en la oficialaj ekzamenoj per ŝtataj organoj, aŭ en la uzado de nia lingvo en turismo kaj poŝto. La krono de ĉio estis la kreo de la Internacia Esperanto-Muzeo (aligita kiel aparta sekcio al la Aŭstria Nacia Biblioteko),

ideo kaj verko de

Hugo Steiner,

homo penetrita de sankta fajro kiun oni trovas nur inter apostoloj. Multajn eksterajn sukcesojn ni devas danki al li kaj malgraŭ aro da sortobatoj, li ne haltis en la nobla tasko kiun li donis al si.

La apogo de la Registaro faciligis multajn klopodojn de niaj agantoj kaj estas nun la momento esprimi nian sinceran dankon, ligitan kun la firma espero, ke tiu-ĉi ofte aktiva intereso daŭru konstante. Tiu-ĉi danko iras ne nur al la nuna, sed ankaŭ al la pasintaj registaroj inter kiuj staras unuavice estinta Prezidanto Wilhelm Miklas, kiun sekvis en tiu-ĉi alta ofico la respektinda Theodor Körner, la alta protektanto de la Jubilea Kongreso ĵus okazinta. Ekstere ne tiom videblan apogon, ĉar tre diskretan, Esperanto trovas ĉe la Ekleziaj Aŭtoritatoj kiel pravas la seninterrompa subteno morala, donita al nia movado flanke de ĉi-tiuj aŭtoritatoj.

Vieno, kie centriĝas la Esperanto-Movado, havas ankoraŭ la privilegion de Urbestro Esperantista,

Franz Jonas,

kies aktiva intereso je Esperanto ne malgrandiĝis, kvankam ofico kaj tempo trudas certan limon.

Por dokumenti la simpatian je nia afero, la poŝto decidis uzi la lingvon sur la poŝtkartoj kun bildoj de turisma karaktero kaj fine aperigi poŝtmarkon je la honoro de nia lingvo, je kio nun sekvis dua, memore je la Jubileo de la Movado. Tion ni dankas grandparte je la aktiva intereso kiun manifestas Sekcia Ĉefo

D-ro Karl Dworschak,

General-poŝtdirektoro kiu siatempe lernis la lingvon. Inter la Ministroj

kiuj aktive partoprenis la movadon troviĝas Dipl. Inĝ.

D-ro Hannes Frenzel,

nuna Prezidanto de la Regna Kalkul-Kortumo, delegito de la Aŭstra Registaro ĉe la Kongreso en Zagreb. Al ili iru nia danko nun kaj ĉiam.

Kiam en jaro 1938 okazis la perforta aliĝo (la vorto *Anschluss* eniris en la negermanan lingvo-uzon de la tiama epoko!) tiam ni komprenis ĉie, ke ankaŭ por multaj el niaj samideanoj venas tagoj de suferado. Ne malmultaj ja estis ili, kiuj devis elmigri, lasi ĉion kion ili kreis, amis kaj flegis. Inter ili aro da Esperantistoj aktivaj troviĝas for de amata patrolando kaj for de Vieno. Aliaj pasigis jarojn da torturo fizika kaj spirita en la koncentrejoj, aliaj pagis per la morto sian fidelecon al ideoj, kiuj ne plu havis vivrajton en tiu-ĉi

kultura centro de Eŭropo. Estos la tasko de estonta historiisto esperantista, memori ĉi tiujn heroojn de paco kaj libereco.

Nuntempe la atento de la tuta liberecama mondo estas direktata al Aŭstrujo, kies sorto estas rea pruvo pri la relativa valoro de donitaj promesoj. Ĉu necesas certigi, ke la Esperantistoj ĉiulandaj morale subtenas la pledon por efektiva sendependeco de tiu-ĉi lando, la unua viktimo de la agreso kaj nun kvazaŭ punata pro ĝi? Kun la silenta protesto pro tiu-ĉi vera maljusteco ligiĝas nia scio, ke tiu-ĉi lando estas vokata ludi ankoraŭ pli gravan rolon en la Esperanto-Movado ol ĝis nun. Subtenante niajn samideanojn tie, en ilia laborado, ni subtenas rekte la tutan movadon.

Hans Jakob.



*Radio-parolantoj el ĉirkaŭ 25 landoj en la
Universala Kongreso en Vieno 1936*

Aŭstra Jubilea Kongreso

Ĝenerala impreson

KOMISIITE de la Estraro de UEA, la Redaktoro de *Esperanto* ĉeestis tiun-ĉi manifestacion por transdoni la bondezirojn de la centra organizaĵo Esperantista. Pro la dato ne estas eble aperigi detalan raporton, sed nur ĝeneralan impreson.

Nu, senrezerve mi devas diri: bonega aranĝo, digna ĉiurilate kaj por ne-esperantistoj nepre konvinka. La centra okazaĵo estis la festa kunveno je la pentekosta dimanĉo, en la pompa salonego de la Landa Parlamentejo de Malsupra Aŭstrujo. Prezidis Doktoro Frenzel, eksministro, prezidanto de la Kalkul-Kortumo; ĉeestis delegitoj de la Ŝtata prezidanto, de la kanceliero, de pluraj ministroj; la eklezian aŭtoritaton reprezentis Ordena Komandoro P. Georg Plank, kiu, mem malnova Esperantisto, legis salutleteron de Kardinalo Innitzer.

Malofte mi spertis tiom belajn alparolojn—veraj prelegoj altpensaj de la urbestro de Vieno, samideano Jonas, de la prezidanto de A.E.F., Direktoro Glüxmann, de K-doro Plank, de D-ro Frenzel; Kortega Konsilisto Steiner, senlaca, per emociaj vortoj honoris la pionirojn de la movado en Aŭstrujo. Eksterlandaj gastoj germana, jugoslava kaj nederlanda salutis la jubilean kongreson. Interesan informon faris Hofrat Steiner pri D-ro-Zamenhof-Fondaĵo de la Direkcio de la Ŝlimbanloko Neydtharting en Supra Aŭstrujo. Nome ĉiujare kvin meritplenaj samideanoj rajtas pasigi 14 tagojn da kuracrestado kun senpaga alveturo de la landlimo kaj eĉ poŝmono de cent ŝilingoj aŭstraj.

Muzikaj prezentaĵoj de konata *Prix*-kvarteto donis agrablan kadron al la manifestacio. Gratulon al la organizintoj (inter ili Kort. Kons. Steiner, Senata Kons. D-ro Grimme, Ofic. Kons. Cech, kaj S-ino Loibel) de tiu-ĉi neforgesebla jubilea kongreso, inde ferminta ĉapitron de laboro kvindekjara.

H.J.

D-ro-Zamenhof-Esperanto-Fondaĵo

Okaze de la Aŭstra Jubilea Kongreso je pentekosto en Vieno estis proklamita la fondo de la Neydtharting'a Doktoro-Zamenhof-Esperanto-Fondaĵo. Fondinto estas samideano Otto Stöber, posedanto de la marĉa banejo en Neydtharting ĉe Lambach, Aŭstrujo. Otto Stöber mem fondis en 1918 la iaman Aŭstrian Laboristan Ligon Esperantistan (ALLE), kies unua prezidanto li estis. ALLE tiam tre aktive kaj sukcesplene laboris por la disvastigo de Esperanto inter la aŭstra laboristaro ĝis ĝia malpermeso pere de la registaro post la civila milito en Februaro 1934. Samideano Stöber tamen restis fervora adepto de la Esperanta ideo kaj nun dediĉis la nomitan fondaĵon honore al nia majstro Doktoro Zamenhof kaj por akceli Esperanton mem.

La fondaĵo estas dediĉata al la Esperantistaro de la tuta mondo kaj donas jare al kvin Esperantistoj sub certaj kondiĉoj jenajn gravajn favoraĵojn:—

- (a) dum 14 tagoj senkostan studrestadon en la kuracdomo de la marĉa banejo Neydtharting kun

fino sur paĝo 214



Tra la Mondo Esperantista



XIV Brazilia Kongreso de Esperanto

En la urbo Curitiba okazis de la 7a ĝis la 14a de januaro 1954 tiu kongreso, kiel unu el la solenoj memorigantaj la Unuan Centjaron de la Politika Emancipado de la ŝtato Paraná. Ĉeestis delegitoj kaj esperantistoj el preskaŭ ĉiuj brazilaj ŝtatoj, dek samideanoj el Argentino, kaj oficialaj reprezentantoj de brazilaj ŝtatoj.

La programo starigita de la Organiza Komitato estis bone plenumita. Prezidanto de la Kongreso estis Prof. J. B. Melo e Sousa. La Solena Malfermo okazis en la aŭlo de la Jura Fakultato de la Universitato de Paraná. La Ŝtatestro, D-ro Bento Munhoz da Rocha Neto, Honora Prezidanto de la Kongreso, parolis ĉe la Malfermo.

Poste transdonis salutojn la reprezentantoj oficialaj, tiuj de la organizaĵoj esperantistaj kaj de la argentina delegitaro. La oficiala oratoro, Universitata Profesoro Valdomiro Teixeira de Freitas, faris esprimoplenan paroladon kiu ricevis grandan aplaŭdon. La muzikistaro de la Ŝtata Policanaro ludis la Brazilan Nacian Himnon, kaj "La Espero".

Viglaj laborkunsidoj traktis tezojn kaj proponojn prezentitajn al la kongreso.

Sed krom la laboro . . . Belaj ekskursoj kaj promenoj, vizitoj al institutoj: kaj okazis meso en la

Ĉefepiskopa Katedralo, dirita de Pastro Francisco de Borges Leal, kun kanto kaj prediko en Esperanto. Estis ankaŭ aranĝita bona arta vespero, kun teatraĵo, kantado, muziko k.t.p.

Multaj gazetoj en la urbo publikigis artikolojn, fotojn kaj informojn pri la kongreso, kaj oni inaŭguris ekspozicion de Esperantaĵoj (libroj kaj leteroj el diversaj landoj). Kiel memorigaĵon pri la Kongreso la oficiala Brazilia Instituto de Geografio kaj Statistiko eldonis luksan ilustritan broŝuron "Urbo Curitiba", kiu estas la sesa volumo de la serio "Brazilaj Ĉefurboj".

Britujo

Dum Pentekosto kunvenis Britaj Esperantistoj en Manchester. Ĉeestis proks. 250 samideanoj ne nur el Britujo, sed ankaŭ el aliaj landoj, precipe Nederlando kaj Novzelando. Digna parto de la vendreda (Interkona) vespero estis kiam la Lordurbestro de Manĉestro bonvenigis la kunvenintojn. La saman vesperon talentuloj per muziko, kantoj kaj deklamado distris la kongresanojn, kiuj kun intereso atentis ankaŭ maoriajn popolkantojn kaj dancon, prezentitajn de Novzelandanoj. Dum la kongreso okazis kunsidoj de sciencistoj, instruistoj kaj aliaj fakaj asocioj, ankaŭ sukcesplena neformala kunveno de literaturamantoj, kiu entuziasme subtenis planojn por eldono de literatura revuo. Tre bone

sukcesis ankaŭ la kongresa balo. La atmosfero dum la tuta kongreso estis ĉiam vigla kaj fervora, ankaŭ tre gaja.

Nia movado havas novan teatran trupon. La burĝono de manĉestraj aktoroj fariĝis plena floro je la pentekosta sabato kiam bele prezentiĝis "Elizabeto Rifuzas". Tradukinto (el la angla *Pride and Prejudice*) kaj reĝisoro estis Norman Smith, samtempe kongressekretario.

Plej grava okazo estis la jarkunveno de BEA. La financa stato de la asocio devigis profundan diskuton pri la kaŭzoj de ŝajna stagno de la movado en tiu lando, kaj estis decidite plialtigi la kotizojn kiel provo forigi la ĉiujaran deficiton.

Fermis la kongreson D-ro Lapenna per parolado en kiu li emfazis la necesecon, ke la movado alprenu definitivon celon, kaj ke ĉiu federacio, grupo kaj individuo konscie kaj unuece aliru ĝin.

Brita Sekcio de KELI

Dum tiu kongreso okazis la Unua Jarkunveno de la Brita Sekcio de KELI. Dum tiu kunveno estis raportite, ke la anaro de ĉi tiu nova sekcio preskaŭ duobligis dum ĝia unua jaro.

Germanujo

Sub gvido de S-ro R. Watier, dek ses membroj de la Esperanto-Sekcio de Télémécanique-Sporting-Club, Nanterre (Francujo) venis al Mannheim por viziti la uzinojn de Firmoj Brown-Boveri kaj Daimler-Benz, kie ili ne nur vidis la teknikan produktadon, sed ankaŭ diskutis kun germanaj sindikatoj pri sindikataj kaj sociaj problemoj en Francujo kaj Germanujo. La kulmina punkto de la renkontiĝo estis publika franc-germana amikecvespero. Oficiala reprezentanto de la ĉefurbestro salutis

la francajn gastojn kaj la raportistoj de la kvar lokaj ĵurnaloj informis siajn legantojn per detalaj kaj favoraj artikoloj pri la celoj de la Esperant-movado kaj la facileco de la interkompreniĝo de Esperantistoj diverslandaj.

Norvegujo

La jarkunveno de Norvega Esperantista Ligo okazis dum Pentekosto apud Haugesund, kaj estis aranĝita de la Esperantoklubo *Mara Vento* en Haugesund. La sabaton la partoprenintoj pasigis en Haugesund, kie ili i.a. estis akceptitaj de la urbestro, lektoro K. Sørensen, en la urbodomo.

Dimanĉon matene la prezidanto malfermis la kunvenon kaj informis pri la kursoj por "Esperantogvidantoj", kiuj okazos somere en Helsingør kaj Lofthus. La kunveno akceptis statutŝanĝon, laŭ kiu ankaŭ infanoj rajtos fariĝi membroj de NEL por malalta kotizo. Oni diskutis proponon inkluzivi abonon al *Norvega Esperantisto* en la membrokotizo, sed tiu propono ne ricevis sufiĉe multajn voĉojn por aprobo. Anstataŭe oni forte admonis al la kluboj varbi abonantojn. Fine oni diskutis kiel starigi kursojn kaj klubojn en novaj lokoj, kaj decidis laŭeble dungi unu eksterlandan instruiston por la venonta sezono.

Oni elektis estraron, el kiu ni citu, ke prezidanto estas C. Støp-Bowitz, vicprezidanto Olav Rygg kaj ĝenerala sekretario Alfred Skyberg. Kiel ĉefdelegito de UEA reelektiĝis Ragnv. Rian.

Okaze de la jarkunveno la Eldonejo Esperanto A/S aperigis novan, grandan Norvegan Kantaron. La Ordena Kolegio disdonis la ordenon de NEL *Pro Merito* al 2 meritplenaj

samideanoj, John A. Nilsen, Bergen, kaj Arne Høgseth, Tromsø.

C. Støp-Bowitz.

Svedujo

La jarkunsido de la Sveda Sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia okazis la 1an de majo en la metodista preĝejo S-ta Jakobo en Gotenburgo. Ĉeestis ĉ. 65 personoj. Elektiĝis nova prezidanto S-ro Ing. Henry Lundin. Diversaj raportoj atestis pri ampleksa agado dum 1953: 204 prelegoj de S-ino Alamo-Sandgren (i.a. en ses pastroseminarioj), longaj



S-ino Anna Alamo-Sandgren

artikoloj pri Zagreb en la kristana gazetaro, ampleksa misiado per evangelia literaturo, feriokursoj, lokaj kursoj, bona gruplaboro, karavano al Svislando, ekonomia bilanco je kr. 22.433:91 (donacoj de membroj kaj subtenantoj kr. 10.086:12).

En la Esperanta Diservo la 2an de majo paroladis Erik Carlén, prez. de KELI, kaj S-ino Alamo-Sandgren. Fine okazis komuna festmanĝo kaj urba rondveturo. Dum la nuna

somero okazos feria kurso en la kristana popola altlernejo de Jönköping kun prelegoj de D-ro J. Stenström, L. Vasiljef kaj S-ino Alamo-Sandgren.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Denis. Al Ges. P. Denis (instituteur, Saudrupt, Meuse, Francujo) naskiĝis filo Bertrand, la 11an de junio, 1954.

Hršel. Al Zdeněk kaj Zdeňka Hršel (SŬJ, Komenského 2, Děčín I, Ĉeĥoslovakujo) naskiĝis unua filino Zuzanka, la 25an de majo, 1954.

Geedziĝoj

Giloteaux-v.Waldowski. Je la 29a de majo, 1954, Lucien Giloteaux, nia Delegito en Croix (Francujo) al Lilli von Waldowski.

Steiner-Supanz. Je la 4a de junio, 1954, Hans Steiner, nia Delegito en Wörgl (Aŭstrujo) al Maria Supanz.

Al ĉiuj, niajn plej korajn gratulojn.

Mortinto

Bennemann. Lastmomente ni sciigis pri la forpaso de samideano Paul Bennemann, kunlaboranto kaj amiko en Leipzig, je la komenco de junio, 1954. En venonta eldono de nia Revuo ni revenos je tiu ĉi ĉagreniga okazaĵo.

Gratulon !

En Nelson, Anglujo, loka historio kreiĝis per la duafoja elekto en 16 jaroj de samideano Skabeno Richard Bland al la ofico de urbestro la 3an de junio. Jam 70-jara, S-ro Bland estas multjara Esperantisto kaj kongrespartoprenanto nunjara.

Laŭ peto de la Estraro de Centra Dana Esperantista Ligo ni publikigas la jenan averton.

La ĉefestraroj de Centra Dana Esperantista Ligo, Dana Laborista Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Federacio de Danaj Altlernejoj avertas siajn membrojn kaj ĉiujn aliajn Esperantistojn kontraŭ rilato al Johs. Vesterland-Andersen, Kopenhago; la spertoj de multaj el niaj membroj pri lia fidindeco devigas nin publikigi ĉi tiun averton.

La esperantistaj fervojistoj kongresis

. . . . de la 3a ĝis 8a de majo en bela Verona, Italujo. Laŭ partoprenantoj, la kongreso fariĝis rekordo, preskaŭ 600 membroj kun familianoj kuniĝis, kompare al kutime 400 dum la lastaj jaroj. Preskaŭ la duono estis Germanoj, sed venis ankaŭ po cento da Danoj, Francoj kaj Nederlandanoj.

La organizado kuŝis en la manoj de nur 2 kolegoj. La manko de helpantoj kaj la pli granda kongresanaro kaŭzis, ke ne ĉiam ĉio iris glate, sed bonvolo kaj la suda vivmaniero glatigis fine ĉiujn ondojn.

La Solena Malfermo, sub gvidado de la prez. de la italaj ferv. esp., staciestro Zacconi el Bologna, aŭdis salutparoladojn de oficialuloj, de vicurbestro prof. Zamboni de Verona, de inĝeniero Angelini, reprezentanto de la itala fervoj-direkcio, de prof. G. Canuto, de la Itala Esp.-Federacio, de la komisiitoj de la fervoj-direkcioj de Aŭstrujo, Germanujo, Saarlando kaj Svedujo, de la fervojaj sindikatoj de Aŭstrujo, Germanujo, Jugoslavujo kaj Svedujo. Tradicie salutis ankaŭ reprezentanto de UEA kaj de la 16 aliĝintaj landaj sekcioj.

La laborkunsidoj, malfeliĉe nebone vizititaj, aŭdis raportojn de la ĉef-estraranoj kaj el ili plej interesis, ke dum sia nur 7-jara ekzisto, IFEF kreskis al organizaĵo de 1600 membroj en 24 landoj. Dum la lasta jaro fondiĝis sekcioj en Hispanujo, Jugoslavio, Maroko, Saarlando kaj Usono, kiuj tuj aliĝis al IFEF. La lastjare akceptita kontrakto pri kunlaboro kun UEA estas taksata kiel vere utila por IFEF kaj la movado. El la decidoj la plej interesaj estas: Aliĝo Al Internacia Organizaĵo de Kulturaj Fervojistoj (artistoj, pentristoj,

verkistoj); ŝanĝo de la nomo de la kongreso, por fari ĝin pli efika laŭ propaganda vidpunkto; kolektado de internacia migranta propaganda ekspozicio; elekto de Zŭrich kiel kongresurbo 1955 kaj prov. elekto de Stockholm por 1956; preparo de kongresa regularo; elekto de rektorato por la fakaj prelegoj dum proksimaj kongresoj.

La terminara komitato, kiu preparas fervojistan fak-vortaron ree diligente laboris kaj pretigis parton el la vasta materialo por submeto al la Akademio kaj posta presigo.

Por altigi la kulturan valoron de la kongresoj estis lastjare en Utrecht decidite pri serio de fakaj prelegoj en ĉiu kongreso. Ĉiu landa sekcio estas devigata kolekti materialon por funda esploro de la temo; por la Verona-kongreso temis pri: "La faka instruado de la junaj fervojistoj". Pri la stato en 10 landoj la kongreso aŭdis prelegojn, kiuj montris diversajn manierojn por veni al bona celo. La kompleta materialo estis transdonita al ĉiuj partoprenantaj landaj sekcioj por ebligi eltiraĵojn, submetotajn al la fervojaj direkcioj kaj sindikatoj. La komenco de tiu grava servo montriĝis sufiĉe bona kaj la elektita rektorato, konsistanta el IFEF-redaktoro de Jong (Nederlando), Walder (Svislando) kaj Ortengren (Svedujo), provos estonte ĉerpi la maksimumon laŭ kvalito kaj kvanto. La temo elektita por 1955 estas: "Instruado kaj ekzamenoj de la lokomotiva personaro".

Dum la lasta vespero la organiza komitato prezentis kabaredan

Gratulon al la Landaj Informaj Fakoj !

POST kelkara sistema kaj insista laborado, ni povas kun fiero konstati, ke la informado pri la Internacia Lingvo atingis tre kontentigan nivelon ne nur koncerne la kvanton, sed ankaŭ koncerne la kvaliton. En tiu ĉi numero de nia revuo estas publikigita tabela tra-rigardo pri la laboro farita sur tiu ĉi kampo en la jaro 1953. Kvankam la ciferoj en la tabelo parolas sufiĉe klare per si mem, tamen estas necese diri kelkajn aldonajn vortojn kaj fari kelkajn komentojn, por ke oni ricevu pli klaran kaj pli tutecan bildon pri tiu ĉi grava flanko de nia aktiveco.

(1) Laboro de la Informa Fakoj de UEA

La tuta gvidado de la priesperanta informado en mondaj kadroj estas centrigita en la Informa Fakoj de UEA. Ĝia ĉefa tasko estas harmoniigi la tutmondan informadon, helpi per konsiloj kaj sugestoj, rekte kontribui per informa materialo. La Informa Fakoj de UEA estas en kontakto kun la informaj fakoj de la landaj asocioj ĉu per cirkuleroj kaj leteroj, ĉu per konferencoj okaze de la universalaj kongresoj. En la jaro 1953 la ĉefa atento de la Informa Fakoj de UEA estis dediĉita al formiĝo de novaj informaj fakoj de la landaj asocioj. Krom tio ĝi plenumis jenajn taskojn :

La Informa Fakoj rekomencis eldonadi la Bultenon de la *Internacia Gazetara Servo*. Ĝis nun entute aperis 26 numeroj de la Bulteno. La Bulteno estas sendata al ĉiuj landaj informaj fakoj. Ĝi enhavas mallongajn aktualajn informojn pri Esperanto.

Fine de Aŭgusto 1953, dank' al interveno de s-ino Isbrucker kaj la subskribinto, la *Mondfederalista*

kongreso en Kopenhago akceptis rezolucion favore al Esperanto. Tiu rezolucio ebligis al niaj aktivuloj en diversaj landoj, precipe en Svedujo kaj Italujo, penetri en tiujn mediojn.

Ankaŭ en 1953 estis liveritaj al la landaj informaj fakoj pluraj *artikoloj* de kunlaborantoj de CED. La artikolo de Prof. Privat sub la titolo "Oni reparaĵas pri Esperanto" estis publikigita en 92 gazetoj kaj revuoj de 9 landoj. La artikolo de Prof. Collinson "Tri lingvaj pioniroj" estis publikigita en 65 gazetoj kaj revuoj en 10 landoj. La artikolo de la subskribinto "Decido de UNESKO pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj" estis publikigita en 295 gazetoj kaj revuoj de 13 landoj. Fine, la artikolo de la subskribinto "Mondfederalismo kaj la lingvaj malfacilaĵoj" aperis en 51 gazetoj kaj revuoj de 6 landoj. Estas menciinde, ke mallongaj informoj pri la decido de UNESKO en Parizo (1952) aperis entute en pli ol 1.500 gazetoj tra la mondo.

Per speciala cirkulero la Informa Fakoj konsilis al la landaj asocioj aktive partopreni en la festoj de la *Tago de la Homaj Rajtoj* kaj de la *Tago de Unuiĝintaj Nacioj*. Bedaŭrinde, oni ankoraŭ ne komprenas la gravecon de nia aktiva partopreno en tiuj kaj similaj aranĝoj. En Roterdamo, kie, ekzemple, la lokaj grupoj partoprenis tiujn aranĝojn, la rezultoj estis tre kontentigaj.

Por faciligi al la kunlaborantoj en diversaj landoj la laboron por Esperanto, *Heroldo de Esperanto* konsentis aperigi serion da artikoloj sub la rubriko "*Defendo de la lingvo Esperanto*". La artikoloj komencis

aperadi nur en la jaro 1954. La artikolo "La lingva demando antaŭ la Eŭropa Konsulta Asembleo", publikigita en *Heroldo* de la 16-a de Novembro, 1953, aperis en la germana kaj sveda tradukoj. Ĝin ricevis ĉiuj germanaj kaj svedaj reprezentantoj en la Eŭropa Konsulta Asembleo.

La informado al internaciaj organizaĵoj kaj al la plej gravaj internaciaj institucioj estas efektivigata de la Centro de Esploro kaj Dokumentado. Ĉi tie estas menciindaj nur jenaj rezultoj :

CED sendas siajn dokumentojn al 162 internaciaj organizaĵoj kaj institucioj en 67 landoj. Ĝis nun CED publikigis 37 dokumentojn. La dokumento CED/3 estas tradukita en la lingvoj : franca, nederlanda, finna, itala kaj ĉeĥa entute en 40.000 ekzempleroj. Laŭ la informoj ricevitaĵ, ĝi bone efikis precipe en la intelektulaj medioj.

La baldaŭ publikigota verko "*La Internacia Lingvo—Faktoj pri Esperanto*" prezentas abundan materialon, kiun la landaj informaj fakoj povos vaste utiligi.

CED ankaŭ preparis kaj liveris *specialan dokumentaron* por la kandidatigo de UEA al la Pacpremio de Nobel, alian dokumentaron por UNESKO kaj por la Eŭropa Konsilantaro.

Nun CED organizas, en kunlaboro kun la Urugvaja Esperanto-Societo, grandegan ekspozicion en Montevideo sub la titolo "*Unua Universala Ekspozicio de Esperanto*". La celo de tiu ekspozicio estas ne nur dokumenti nian aferon al la delegitoj ĉe la UNESKO-Konferenco, sed ankaŭ montri al la Urugvaja, eĉ al Sudamerika publiko la atingiĝojn de Esperanto.

(2) Laboro de la landaj informaj fakoj

La ciferoj publikigitaj en la tabela trarigardo prezentas faktojn aŭ informojn, pri kiuj la koncerna informa fako povis absolute fidine raporti, aŭ proksimuman takson, prefere malaltan. Konsiderante tion ĉi, kiel ankaŭ la fakton, ke pluraj grandaj landaj asocioj, ekzemple la Japano, ne respondis al la demandaro, estas certe, ke la laboro farita sur la kampo de informado en la pasinta jaro estis multe pli ampleksa, ol montras la publikigitaj ciferoj. En la trarigardo troviĝas informoj nur pri la rekte propagandaj aranĝoj. En la rubriko prelegoj, ekzemple, temas nur pri nacilingvaj prelegoj, en kiuj estis pritraktita la afero de la Internacia Lingvo. Same tiel la rubriko radio-prelegoj rilatas nur al nacilingvaj prelegoj pri Esperanto. Evidente, diversaj Esperantaj aranĝoj, ekzemple naciaj kaj internaciaj kongresoj kaj konferencoj, Esperantlingvaj radio-elsendoj, Esperantlingvaj prospektoj pri diversaj urboj k.t.p., havas ankaŭ grandan propagandan valoron, sed ili ne estas prenitaj en konsideron en la tabela trarigardo.

Diversaj informaj fakoj aplikis ankaŭ aliajn metodojn de informado. Jen kelkaj el tiuj metodoj, kiuj facile povus esti utiligataj ankaŭ de la aliaj fakoj :

La Flandra informa fako organizis varietean feston en la teatro de Brugge. Ĉeestis 700 personoj kaj la disdonita programo enhavis partan tradukon de la supre menciita dokumento CED/3.

La Brita Asocio publikigis plurajn pagitajn reklamojn en gazetoj ; ĝi sukcesis meti 65 afiŝojn en diversaj

stacidomoj; ĝi regule sendas specialan bultenon al la nacia gazetaro.

La Itala informa fako sciigas, ke en kelkaj italaj urboj funkcias konstanta montra fenestro; krom la bulteno "Notiziario", la itala fako sendas 3-4 fojojn en la jaro komunikojn al la nacia gazetara agentejo ANSA. Ĝi skribas: "Per abono al la nacia gazeteltonda oficejo ni ricevas ĉiujn publikaĵojn pri Esperanto kaj, kiam necesas, ni polemikas tre sukcese; per tiu organizo ni kontrolas la evoluon de la publika opinio rilate al Esperanto de jaro al jaro."

La Jugoslaviaj informaj fakoj raportas pri organizado de malgrandaj ekspozicioj en la elmontrofenestroj kaj vitrinoj de librovendejoj. Dum la UK en Zagreb la plej legata ĵurnalo "Narodni List" havis ĉiutage Esperantlingvan rubrikon.

La Nederlanda Asocio eldonas kvarpaĝan nacilingvan gazeton, kiu enhavas artikolojn kaj informojn pri Esperanto. Ĝi aperas 4 fojojn en la jaro kaj la eldonkvanto estas 10.000 ekzempleroj.

La Nordamerika Asocio sukcese propagandis per televido kaj pagitaj anoncoj en la nacilingvaj gazetoj.

En Pollando, kie la esperantistoj laboras en tre malfavoraj kondiĉoj, ne ekzistas speciala informa fako. La tiea asocio aperigis plurajn anoncojn pri la koresponda kurso en lokaj kaj provincaj ĵurnaloj. Bedaŭrinde, "pro la manko de loko" oni ĉesigis la aperigadon eĉ de tiaj pagataj anoncetoj. Tamen la interesiĝo pri Esperanto estas konsiderinda: La sekretario ricevis 882 leterojn, el kiuj 437 rilatis al la koresponda kurso.

La Sveda Asocio sendas sian landan organon regule al diversaj altranguloj,

membroj de la UNESKO-Komisiono, Eŭropa Konsilantaro kaj Eduka Ministerio. Konsiderante la fakton ke la gazeto estas tre bone redaktata, tiu sendado certe havas utilan efikon.

(3) Konkludo

La ĉiam pli bona, pli organizita kaj planita laboro sur la kampo de informado donas ĉiam pli kontentigajn rezultojn. Preskaŭ en ĉiuj landoj de la mondo kreskis la interesiĝo pri Esperanto. Al tiu kresko sendube kontribuis ankaŭ la klopodoj ĉe UNESKO, ĉe la Eŭropa Konsilantaro kaj en diversaj aliaj medioj. Ni devas daŭrigi la marŝadon antaŭen sur tiu ĉi vojo, ĉar ĝi kondukas al la celo.

Antaŭ nelonge mi legis en iu franca gazeto artikolon, en kiu svarmis plej diversaj stultaĵoj pri la Internacia Lingvo. Interalie la verkinto asertis, ke la esperantistoj "faras grandan bruon en la tuta mondo, ĉar ili disponas pri neelĉerpeblaj financaj rimedoj". Havante antaŭ mi sur la skribotablo la materialon pri la informa laboro en 1953, mi rememoras pri tiu ĉi fantaziaĵo el la franca gazeto. Fakte, por nia tuta monda informado ni havas je dispono ne pli ol estas duona jara salajro de kiu ajn instruisto de kiu ajn lingvo en kiu ajn lando! Sed, se ni ne disponas pri financaj rimedoj, la Movado feliĉe disponas pri io, kio ne estas pagebla per mono: la entuziasmo, la amo al la granda idealo, la profunda konvinko pri la korekteco de la elektita vojo, la sindonemo de centoj da oferemaj batalantoj.

Dankon kaj gratulon al la informaj fakoj de la landaj asocioj, al iliaj gvidantoj kaj kunlaborantoj!

D-ro Ivo Lapenna.

TABELA TRARIGARDO pri la INFORMA LABORO en 1953

Landa asocio at lando	Adreso de la Informa fako		Numero de		Prelegoj		Radio- prelegoj pri E.	Ekspozicioj		Disdonitaj afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj	Cu interesigo pri Esp. kreskis
			artikoloj	informoj	Numero	Ce- estintoj		Numero	Ce- estintoj		
Argentina	Hugo A. Lingua, La Paz 1032, Dto 3, Rosario		50	40	15	700	—	4	350	9,000	Tre kreskis
Belga (Reĝa Ligo)	Michel Pilloy, 18 rue de Franquennes, Ottignies (Brabant)		209	300	—	—	—	—	—	—	Iom kreskis
Belga (Flandra Ligo)	G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, Sint-Kruis		3	50	—	—	—	—	—	400	Stagnas
Brazila	Prof. Carlos Domingues, Rua Alvaro Alvim 27, Rio de Janeiro		60	2,500	80	4,000	120	8	20,000	20,000	Kreskis
Brita	J. W. Leslie de B.E.A.		5	612	—	—	—	1	80,000	120,000	Kreskis
Dana	Willy Nielsen, Fynsgade 15, Hjørring		20	100	—	—	—	2	67,000	?	Stagnas
Finna	Vilho Setälä, Irislahti, Matinkylä		2	100	3	200	—	2	300	1,000	Senŝanĝa
Franca	S-ro Le Moal, U.E.F., 34 rue de Chabrol, Paris X		18	450	90	10,000	230	8	10,000	60,000	Kreskis
Germana (E. Unuiĝo, Köln)	M. Schumacher, Köln-Weidenpesch		322	79	—	—	—	—	—	—	Kreskis
Hispana	Dario Rodrigues López de Silva, Str. Galileo 51, Madrid		106	28	2	—	300	1	4,000	7,000	Kreskis
Honduraso	Ne ekzistas—Informis T. Sekelj		8	12	2	120	1	—	—	—	Kreskis

Itala	G. C. Fighiera, Via Spallanzani 15, Torino	366	302	18	2,000	16	4	80,000	10,000	Bone kreskis
Jugoslavio (Kroatia Ligo)	M. Gjivoje, Vodnikova 19, Zagreb	400	200	16	2,000	10	6	15,000	900	Ege kreskis
Jugoslavio (Slovenia Ligo)	P. Zlatnar, Rimska 7, Ljubljana	5	84	—	—	13	5	2,500	7,750	Tre kreskis
Kostariko	Virginia Gonzales, Aptado 740, San José, Costa Rica	20	15	5	800	1	—	—	—	Kreskis
Nederlanda	Oosthoek, Bree 49a, Rotterdam	80	700	70	2,200	—	10	1,100	45,000	Kreskis
Nikaragvo	Ne ekzistas—Informis T. Sekelj	7	10	5	600	—	—	—	—	Kreskis
Nordamerika	EANA, 114 W 16 St., New York 11, N.Y.	9	32	7	1,000	8	3	?	25,000	Kreskis
Norvega	K. G. Sellin, Box 942, Oslo	200	534	17	410	—	2	?	1,000	Iom kreskis
Salvadoro	Ne ekzistas—Informis T. Sekelj	12	15	4	500	—	—	—	—	Kreskis
Saarlanda	August Omlor, St. Ingbert, Beethovenstr. 36	20	91	4	200	—	1	150	—	Kreskis
Sveda	SEF, Tegelbacken, Stockholm	47	476	224	11,000	—	5	270,000	13,500	Kreskis
Svisa	B. Graŭ, Hubelweg 7, Biel-Bienne	250	—	5	250	1	1	1,000	1,500	Kreskis
Urugvaja	V. L. Cao, Brandzen 2267, Montevideo	5	40	7	?	22	2	?	1,000	Ne kreskis
23 respondoj	Entute	2,224	6,770	574	35,980	722	65	551,400	323,050	Generale kreskis

ROMANKONKURSO

Universala Esperanto-Asocio anoncas konkurson por originala, ĝis nun ne aperinta, Esperantlingva romano.

Kondiĉoj

1. La temo estas laŭplaĉa. Amplekso: maksimume 300,000 litertipoj.

2. Sendu vian verkon kun pseŭdonimo al la jena adreso: S-ro K. Lawrence, 244 Quinton Road, Harborne, Birmingham 17, Anglujo, aldonante apartan koverton ekstere kun la pseŭdonimo interne, kun vera nomo kaj adreso. Pri la sekreteco de la konkurso respondecas la ĵusmenciita peranto.

3. Aldonu 5 maldekstre stampitajn internaciajn respondkuponojn, aŭ tiom, kiom via eventuala enlanda leĝo permesas. Se laŭ la reguloj de la lando oni ne rajtas elsendi respondkuponojn, ni akceptas ankaŭ konkursaĵojn sen respondkuponoj el tiaj landoj.

4. Skribu per maŝino, uzante nur unu flankon de la papero. Ensendu du ekzemplerojn de via manuskripto.

5. Limtempo por alveno de la manuskriptoj:

La 31a de majo, 1955

Pri la nomoj de la trimembra juĝa komisiono informos vin sekvonta numero de la revuo *Esperanto*.

Premioj

La plej bona konkursaĵo ricevos kiel unuan premion 10 britajn pundojn. Verko kun la dua distingo estos premiata per 5 britaj pundoj.

Konkursante oni akceptas la kondiĉon pritrakti unuavice kun UEA pri la eldono de la konkursaĵo en libroformato.

Se la verkoj ne atingus la deziratan nivelon, la komisiono rezervas al si la rajton pri ne aljuĝo, aŭ dispartigo de la premioj.

*D-ro Ferenc Szilágyi,
sekretario de la konkurso.*


Muzika kaj Mondlingva Konkurso "Ariel"

Laŭ interkonsento kun la inicianto ni plilongigis la limtempon de la konkurso "Ariel" ĝis la 20a de aŭgusto, 1954. Tiu plilongigo tamen ne rilatas la branĉon "Laŭro Verona".

La juĝa komisiono de la konkurso konsistas el eminentuloj konataj parte en la tutmonda kultura vivo, parte en la kultura vivo de nia movado. Jen iliaj nomoj: Profesoroj Umberto Maria Beretta kaj Andrea Mascagni (Italujo), komponisto F. Moolenaar (Nederlando), F-ino Birthe Traerup (Danlando)—por la muzika "Laŭro Kolomano Kalocsay"—licenciato Arthur Foote (Anglujo), Red. Luis Hernandez (Hispanujo), profesoro M. Fernández Menéndez (Urugvajo), D-ro John Stenström (Svedujo), prof. Clelia Conterno Guglielminetti, kaj verkisto Mariano Rugo (Italujo) por la ceteraj branĉoj.

Por la Laŭro Urugvajo oni rajtas konkursi ne nur per hispanlingvaj tradukoj de bonaj, modernaj Esperanto-poeziaĵoj (aperintaj post 1930) sed ankaŭ similaj en la itala kaj portugala lingvoj.

Informojn donas: D-ro F. Szilágyi, 3-dje Villag. 26, Borås, Svedujo.



Centro de Esploro kaj Dokumentado

300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

Lasta Alvoko por la Ekspozicio

Laŭ la informoj, pri kiuj disponas CED, ĝis la fino de Majo, 34 organizaĵoj, institucioj kaj unuopaj esperantistoj sendis materialon por la ekspozicio en Montevideo. Kvankam la stato pliboniĝis, ĝi tamen ne estas kontentiga. Tialla Organiza Komitato de la ekspozicio en Montevideo kaj CED en Londono ankoraŭfoje plej ĝentile, sed tre insiste petas pri alsendo de valora kaj abunda materialo al Montevideo. Ankoraŭfoje :

(1) Ĉiu eldonejo sendu po unu ekzemplero de ĉiu sia publikaĵo ; (2) Ĉiu redakto de Esp. gazeto aŭ revuo sendu lastjaran kompletan de la koncerna revuo aŭ gazeto, aŭ almenaŭ kelkajn lastdatajn ekzemplerojn ; (3) la personoj, laŭ kies iniciato estis publikigitaj turismaj prospektoj kaj gvidlibroj, komercaj reklamoj k.s., aŭ kiuj prizorgis Esperantlingvajn resumojn, artikolojn en nacilingvaj gazetoj, Esperantajn kursojn en nacilingvaj gazetoj k.s., sendu la koncernajn publikaĵojn ; (4) ĉiu landa kaj faka asocio, ĉiu Esperanto-societo kaj alia organizaĵo sendu siajn proprajn publikaĵojn ; (5) la landaj asocioj, krome, sendu ĉion alian, kio estis publikigita en ilia lando kaj kio ne estas sendita de organizaĵoj aŭ personoj sub 1-4, precipe ne plu vendatajn librojn, aŭ ne plu aperantajn gazetojn kaj revuojn ; (6) ĉiu unuopa esperantisto trarigardu sian propran bibliotekon kaj sendu tiujn publikaĵojn, kiujn li ne bezonas.

Estas ankoraŭ tempo por kontribui al tiu grava ekspozicio, de kiu multrilate povas dependi la rezulto, kiun atingos nia Movado ĉe UNESKO. Tial, oni agu senprokraste kaj sendu la materialon al la adreso : **S-ro Rodolfo García, Calle Yaguarón 1397, Montevideo, Urugvajo.**

Memoru : ĉio, absolute ĉio, estos bone utiligita. Se estos pluraj ekzempleroj de la sama publikaĵo, ni formos el tiu supermaterialo specialajn malgrandajn ekspoziciojn, kiujn ni sendos al diversaj landoj, precipe al Azio okaze de la granda propaganda vojaĝo de S-ro T. Sekelj.

Malgrandaj informoj


La kunlaboranto de CED, S-ro *W. G. Atkinson*, ellaboris 10 skizojn de grafikaĵoj pri diversaj aspektoj de la Esperanto-Movado. La grafikaĵoj estos reproduktitaj en multe pli granda formato, en pluraj koloroj, sur fortika kartono kaj ekspoziciitaj en Montevideo dum la Unua Universala Ekspozicio de Esperanto. Sur la p. 214-217 de nia revuo ni reproduktas 4 el tiuj skizoj, ĉar estus konsilinde, ke oni utiligu ankaŭ en aliaj landoj okaze de ekspozicioj la bonegajn ideojn de S-ro Atkinson.

La kunlaboranto de CED, S-ro *E. P. Ockey* verkis liston de libroformaj tradukoj en Esperanto el la angla lingvo. La listo ampleksas 156 erojn.

La kunlaboranto de CED, S-ro *Reto Rossetti* ellaboris specialan liston
fino sur paĝo 224

Heroeca sinofero

EN la jaro 1951 okazis en Ĝenevo Mondfederalista Kongreso. Partoprenis tiun ĉi manifestacion Vietnamano Vo Thanh-Minh, kiu aŭdinte Esperanton, interesiĝis je ĝi. La Biblioteko de UEA havigis al li lernolibron en lia propra lingvo, aperinta antaŭ la milito. Kelkan tempon poste la nova adepto jam sciis esprimiĝi tre bone. Li pledas por la unueco de sia lando, por ĝia sendependiĝo kaj libereco. Vivante en tendo, simple kiel apostolo, li venis Eŭropon por konatiĝi kun ĝi. Poeto, ĵurnalisto, li instruis la junularon en sia lando, partoprenis skoltan organizon. Lin konas persone Ho-Ŝi-Minh kaj la eks-imperiestro Bao-Daj. Tiu lasta lin akceptis en Ĝenevo, okaze de lia vizito.



Vo Thanh-Minh kun sia tendo en privata ĝardeno kontraŭ la ĉefa enirejo de la Palaco de la Nacioj en Ĝenevo

Okaze de la Azia Konferenco en Ĝenevo, nia samideano venis kiel ĵurnalisto. Vidante la senfinan traktadon pri proceduro en tiu ĉi konferenco, dum daŭras la milito en lia lando, li decidis laŭ la ekzemplo de

Gandhi, protesti per fasto. Neniu ridis: oni ĉie komprenis tiun ĉi sinoferon kiel demonstracion kontraŭ la egoismo de potenculoj. Oni provis ke li ĉesigu sian fastadon; oni eĉ petis ke intervenu Abato Pierre (ĵus en Ĝenevo) kaj Doktoro Edmond Privat, sed komprenante la animon de nia Vietnamano samideano ambaŭ rifuzis fari premon. Nun, kiam estas skribitaj ĉi tiuj linioj, Vo Thanh-Minh estas en la hospitalo laŭ ordono de la aŭtoritatoj kaj de la kuracisto, kiu regule vizitis lin. Ĝenevaj Esperantistoj ne mankis inter la simpatiantoj, kiuj multnombro montris komprenon kaj estimon.


Paul Bouvier.

Internacia Konkurso 1954

Stato je la 31a de majo

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Finnlando ..	2000	2725	136.3
2. Kanado ..	250	310	124.0
3. Svislando ..	1500	1655	110.3
4. Maroko ..	700	765	109.3
5. Germanujo ..	3600	3925	109.0
6. Nederlando ..	4600	4985	108.4
7. Urugvajo ..	250	270	108.0
8. Sudafriko ..	300	320	106.7
9. Danlando ..	2500	2665	106.6
10. Svedujo ..	5900	6065	102.6
11. Portugalujo ..	500	510	102.0
12. Japanujo ..	900	850	94.4
13. Francujo ..	5600	5277	94.2
14. Jugoslavujo ..	1600	1496	93.5
15. Hispanujo ..	1600	1485	92.8
16. Islando ..	350	315	90.0
17. Novzelando ..	850	761	89.5
18. Britujo ..	9500	8434	88.8
19. Usono ..	2300	2039	88.7
20. Aŭstrujo ..	850	745	87.6
21. Italujo ..	2900	2530	87.2
22. Belgujo ..	2300	1970	85.7
23. Aŭstralio ..	1000	820	82.0
24. Kubo ..	250	200	80.0
25. Izraelo ..	250	190	76.0
26. Norvegujo ..	2300	1500	65.2
27. Irlando ..	250	155	62.0
28. Argentino ..	950	585	60.5
29. Venezuelo ..	250	150	60.0
30. Brazilo ..	6400	2870	44.8

Julio Baghy



Je mia 63-a naskiĝtago


Ĉio jam iĝas funde vunda,
senfekunda ;
nana mi estas, restas nana :
vivo vana.

Por kio indas noble spiti,
forgesi devas, ne agiti,
vegeti celperdinte tag' post tag'
sciante, ke progreso estas blag'
kaj teorio en praktiko
nur mistifiko
kaj intrigo.

Ĉio jam iĝas fore fora,
senkolora ;
sola mi estas, restas sola,
senkonsola,
Negrava kien, kiel iri ?
min tedas revii kaj sopiri ;
repaŝas ĉiu al pasint'.
Min ne plu logas supren la montpint',
sed tiras suben la deklivo
de laca vivo,
aĉa vivo.

13an de januaro, 1954

Tra la Libraro



Duope ricevitaĵajn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevitaĵajn nur mencias.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.*

L'Esperanto cet inconnu, de André Ribot. 21 × 12.5 cm., 74 paĝoj. Editions Albin Michel, 22 rue Huyghens, Paris 14. Prezo 100 fr. frankoj.

Sub la por Esperantistoj iom incita titolo, "Esperanto, tiu-ĉi nekonato"; la verkinto prezentas en taŭga formo la problemon de internacia lingvo, ĝia solvo per Esperanto, la strukturon de la lingvo, lecionon gramatikan en rakonta formo. La kvara ĉapitro "Esperanto, lingvo vivanta kaj literatura", priskribas objekte la praktikadon de la lingvo, donas bildon de universala kongreso (de la Pariza 1950) kaj finas per ekzemploj el poezio (kun traduko franca). Sub "Opinioj kaj deziroj" sekvas juĝoj pri Esperanto de eminentaj homoj, politikistoj, industriuloj, komercistoj, verkistoj-scienculoj, k.t.p., kion finas la deziroprimo de la 42 membroj de la Akademio pri Scienco (*Institut de France*) de 1924. Fine sekvas listo de la Esperantistaj organizaĵoj, kaj la teksto originala de la propono prezentita de ok deputitoj al la Franca Parlamento 21.6.53 pri la instruado de Esperanto en lernejoj.

Tiu-ĉi broŝuro aperas en taŭga momento, ĉar mankas detala, objektiva kaj ni aldonu tion, ne teda informaro pri nia afero en franca lingvo. Estas ekster dubo ke niaj francaj propagandistoj scios sin servi per tiu ĉi armilo, diligente kaj konscie kompilita de samideano Ribot.

H.J.

Dati Informativi sulla Lingua Internazionale Esperanto (Informaj notoj pri la Internacia Lingvo Esperanto), 40 p., 22 × 28 cm., itallingve verkita, multobligita, kun presita eleganta kovrilo, moderne bindita, eldonita de Itala Esperanto-Federacio, Via Saluzzo 44, Torino, prezo 7 respondkuponoj.

La Informa fako de la Itala Esperanto-Federacio, unu el la plej bonaj informaj institucioj de niaj landaj asocioj, ĵus publikigis tiun ĉi gravan dokumenton. Ĝi konsistas el 3 partoj. La unua estas simpla traduko de la konata dokumento CED/3. La dua parto pritraktas la organizon kaj atingiĝojn de la Esperanto-Movado en Italujo. La tria parto konsistas el 17 gravaj dokumentoj pri la Internacia Lingvo. Tiu ĉi bonega publikaĵo, kiu ne nur laŭ la enhavo, sed ankaŭ el vidpunkto de la formo digne prezentas la aferon de la Internacia Lingvo, certe firmigos la pozicion de Esperanto en Italujo tute speciale en la intelektulaj medioj.

I.L.

Esperanto, Die zweit Sprache für jedermann (La dua lingvo por ĉiu), multobligita, broŝurita kun bela presita kovrilo, 20.5 × 14.5 cm., eldonita de Internacia Esperanto-Muzeo, Hofburg, Wien I. 44 p., prezo 3 respondkuponoj.

fino sur paĝo 212



Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.

La Internacieco de Esperanto

Mi estas pli ol surprizita pro la letero de S-ro Bernard Long (*Esperanto*, Junio, p. 174). Ne nur, ke oni povas diri "permesu al mi", sed, laŭ mia opinio, oni devas diri precize tiel. Nek laŭ la ĝenerala praktiko—la supera leĝdonanto de la lingvo—nek laŭ Plena Vortaro estas bone diri "permesu min", kiel tion asertas S-ro Long. Kiu ankoraŭ dubas, bonvolu kontroli en P.V., p. 362.

Laŭ la ĝenerala lingvouzo, sankciita en Plena Vortaro (p. 336), oficisto estas "homo, kiu profesie plenumas oficon: banka, komerca, publika, regna, ŝtata, urba, dogana, polica, oficisto". Senkonsidere al la demando ĉu la estraranoj de BEA ricevas ian ajn monan rekompencan aŭ ne, ili en neniu okazo povus esti "oficistoj". Ne temas ĉi tie nur pri mona rekompenco, sed pri *difinita laborrilato* inter dunganto kaj dungato *profesie* plenumanta iun oficon, pri *difinita tipo* de mona rekompenco (salajro), kun *difinitaj juraj sekvoj* (asekuro, rajto je pensio, kondiĉoj de maldungo k.t.p. depende de la internaj juraj sistemoj de diversaj landoj).

Mi opinias, ke, antaŭ ol korekti kies ajn lingvon (ne nur publike en la oficiala organo de UEA, sed eĉ en privata kurso por komencantoj) estus utile konsulti bonan vortaron aŭ gramatikon en ĉiu nur iom duba kazo.

S-ro Long verŝajne ne agis tiel. Tial li diris, ke mi dufoje uzis en mia artikolo la vorton "serioza" kie, laŭ lia opinio, "la ĝusta vorto estus *grava*". La vorto "serioza" estas korekte uzita en ambaŭ kazoj. Kiu ankoraŭ dubas, bonvolu kontroli en Plena Vortaro, p. 425 (signifo 3).

La esenca celo de la artikolo pri la internacieco de Esperanto estis atentigi pri serioza danĝero. Mi tre bedaŭras, ke eminenta esperantisto kiel S-ro Long pretervidis tion. Anstataŭ principe diskuti la demandon, li serĉis haron en ovo kaj devigas min—vere superflue, tede kaj kontraŭ mia volo—publike atentigi lin, ke ĉifoje li ne trovis ĝin.

La rubriko "Nia Forumo" estas principe utila. Tamen, kian sencon povas havi publikigo de kontribuaĵoj, kiuj ne nur nenion klarigas, sed, male, erarigas kaj konfuzas la leganton?

Ivo Lapenna.

Ankoraŭ ne

Kiam mi unue studis nian lingvon oni instruis al mi, ke ĉar la esprimoj *ankoraŭ ne*, *ne jam* kaj *jam ne*, *ne ankoraŭ* estas ja egalsencaj, estas konsilinde uzi nur tiujn formojn *jam ne* kaj *ankoraŭ ne*.

Dum jaroj verkistoj observas ĉi tiun regulon, sed lastatempe pli kaj pli ofte mi renkontas tiujn formojn kun *ne* antaŭe; kaj ne malofte en malĝusta senco.

En “Lingvaj Respondoj” (N-ro 26) Zamenhof diras: “La esprimon *ne jam* mi tute ne konsilas uzi, ĉar ĝi povus kaŭzi miskompreniĝon: anstataŭ ĝi mi konsilas uzi *ankoraŭ ne*”.

Mi rimarkis ĉi tiun misuzon ĉe verkistoj de diversaj nacioj, do ĝi ne estas traktita de D-ro Lapenna.

Mi multe ĝuus legi artikolon de lia plumo pri enrampantaj eraroj, kiuj ne devenas de apartaj naciaj parolformoj.

T. K. Slade, Anglujo.

Indoĉinujo—Hindoĉinujo

Vietnamo—Vietminh

Komplika tiu ĉi mondo, ĉu ne? Kial fari ion simple, se oni povas tiom facile komplikigi! Jen konstato, kiam oni serĉas klarigi al si diversajn nomojn ofte revenintajn nuntempe.

Laŭ mi oni devus uzi en Esperanto *Indoĉin'* kaj ne *Hindoĉin'*. Ĉiuj lingvoj forlasis la literon *h*. Pri Hindujo la afero estas jam pli malsimpla kaj iam oni devus reguligiti.

Restas la nomo de Annam kiun ni lernis en la geografia leciono, la tutaĵo de la indoĉinaj landoj. Nu, tiu ĉi dusilaba vorto An-nam signifas nenion alian ol “pacigita sudo”. La unua silabo estas ĉina kaj ne de la enlanda lingvo. En jaro 1802 la nomo Viet-nam estis akceptita pli-malpli kiel protesto kontraŭ la nomo Annam; Viet-nam signifas “Brilo de l'Sudo”, Viet-Minh “Brilo de l'Nordo”.

Sekve en Esperanto ni devas diri Vietnamo por la lando, Vietnamano por la loĝanto. Niaj nomoj por landoj ĝis nun homogenaj laŭ radiko ricevas fremdan elementon kio ne simpligas la komprenon.

Georges Agricola, Svislando.

Tra la Libraro : *fino*

En interkonsento kun CED de UEA, la Internacia Esperanto-Muzeo eldonis tiun ĉi verketon okaze de la vizito de eksterlandaj diplomatoj, akredititaj en Wien, al la Muzeo. La broŝuro estas verkita en la germana kaj Esperanta lingvoj. En ĝi estas prezentitaj la plej gravaj faktoj koncerne Esperanton. S-ro H. Steiner, Direktoro de la Muzeo, sukcesis en konciza formo doni objektivan bildon pri la Internacia Lingvo. La broŝuro signifas tre gravan elementon en la ĝeneralaj klopodoj de UEA informi pri Esperanto la kompetentajn instancojn de diversaj ŝtatoj antaŭ la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo.

I.L.

Sennacieca Revuo 1954. Nova serio no. 82. Eldonita kaj redaktita de SAT, 67 Avenue Gambetta, Paris 20. 27.5 × 22.5 cm., 56 paĝoj. Ilustrita. 200 fr. frankoj aŭ egalvaloro.

Tiu ĉi tria kajero de la nova serio estas aparte interesa pro artikolo pri H. Hodler, la fondinto de UEA; ne malpli leginda estas “Pri lingvo-diverseco; pri penso kaj lingvo—”, kun bildoj de distingaj lingvistoj Ferdinand de Saussure kaj Ivan Petroviĉi Pavlov (atentu, ke oni intermiksas la tekstojn sub la nomoj de ambaŭ: de Saussure devas esti Pavlov!)

La kajero enhavas entute 14 artikolojn de plej malsamaj verkintoj. Priparoli ĉiujn kritike ne permesas la disponebla spaco. Entute la kajero prezentas pliriĉiĝon de nia perioda verkaĵaro.

H.J.

Tibor Sekelj :

Proksima Oriento Vokas

ANTAŬ kvin jaroj UEA aprobis dum la 34a Kongreso mian ideon pri la kreado de "speciala senditaro", kies tasko estus batali por Esperanto en landoj, kie nia Movado ankoraŭ ne ekzistas, aŭ suferas gravajn mankojn. Tamen la decido ne ricevis ĝis nun konkretan realigon, precipe pro manko de taŭga organiza projekto, kaj persono kiu pretus preni sur sin la organizan taskon.

Dum la ĵusa paska kunsido de la Estraro de UEA estas aprobita nova projekto, ĉifoje konkreta kaj baldaŭ realigota, kiu samtempe estos la komenco de plenumo de la unua projekto. Temas pri agado favore al Esperanto en la Proksima Oriento, por kiu UEA komisiis min kiel "specialan senditon".

Agadkampo. La Agado en Proksima Oriento (APO) etendiĝos en la landoj de nordorienta Afriko kaj sudokcidenta Azio, proksimume laŭ la jena ordo: Turkujo, Sirio, Libano, Izraelo, Jordanio, Egiptujo, Sudano, Etiopio, Somalio, Jemeno, Adeno, Omano, Arabujo, Irako, Irano, Afganistano, Pakistano, Hindujo, Cejlono kaj Nepalo. Nur en kelkaj el tiuj landoj ekzistas Esperantistoj, dum en la ceteraj la tereno estas tute virga.

Agadmaniero. Mi vojaĝos akompanata de ĝis dek kunlaborantoj, por povi plenumi laboron efikan kaj daŭran. La unua tasko estos ĉie intervjui la landajn aŭtoritatojn, kiel ŝtatestron, edukministron k.t.p., por diskuti kun ili la eblecon de enkonduko de Esperanto en ilia lando. Poste sekvos paroladoj en diversaj medioj kaj en diversaj urboj de la lando, por

fine instalii plurajn kursojn, laŭ la ebleco. Tiu laboro daŭros unu aŭ du monatojn, post kiu la karavano daŭrigos la vojaĝon, postlasante nur unu aŭ du el la kunlaborantoj, por gvidi la kursojn kaj zorgi pri la komenciĝanta movado. Poste, laŭbezzone, kompletigos la nombro da kunlaborantoj, per freŝaj fortoj. La komenca agado daŭros proksimume du jarojn, kvankam la laboro de ĉiu kunlaboranto dependos de liaj personaj cirkonstancoj.

Financoj. Laŭ la projekto, la APO ne devas pezi sur la budĝeto de UEA. Pro tio, ĉiu partoprenanto devas disponi pri iom da mono por siaj personaj elspezoj dum certa tempo, aŭ iamaniere povi vivteni sin dumvoje. Estas tre verŝajne, ke tiu zorgo ĉesos por la kunlaborantoj, kiuj restos en iu difinita lando kiel instruistoj, ĉar ni povas esperi, ke ili sin vivtenados per instruado de Esperanto, ĉu ricevante salajron de la ŝtato aŭ lernejoj, ĉu de la lernantoj mem.


Tamen, ĉar la elspezoj estas grandaj, ni bezonas iom da helpo de la esperantistaro. Laŭ propono de s-ano E.S. el Buenos Aires, ni decidis peti tiun helpon en formo de uzitaj poŝtmarkoj, en kiu ajn kvanto, kiujn poste oni klasigos kaj vendos. Do, la personoj, kiuj deziras helpi per kvanto da poŝtmarkoj, bonvolu komenci kolekti ilin, kaj ĝustatempe ni anoncos kien oni sendu ilin por klasifiko kaj utiligo. Vian helpon ni antaŭdankas.

Personaro. Ankoraŭ mi ne elektis ĉiujn kunlaborantojn, sed dum la kongreso en Haarlem mi intencas kompletigi la liston. Por aparteni al

fino sur paĝo 216

INTERNACIAJ KONGRESOJ


Kongresoj kiuj
ne uzas Esperanton



385 laborhoroj

Parolado de unu horo ĉe
U.N. perdigas 385 horojn da
traduklaboro kaj reaŭdigo en
la aliaj oficialaj lingvoj.

Kongresoj kiuj
uzas Esperanton



1 laborhoro

Parolado de unu horo en
kongresoj uzantaj sole Esperanton
postulas precize unu horon
da tempo.

D-ro Zamenhof-Fondaĵo, *fino*

plena regalo kaj uzo de la
Esperantobiblioteko ;

(b) ĉiutage senkostan banon en la
marĉa kurachanejo ;

(c) kompenson de la fervoja tarifo
de la aŭstra limo al Neydharting
kaj reen al la limo por ekster-
landanoj kaj por aŭstraj
stipendantoj de la loĝloko al
Neydharting kaj reen ;

(d) ĉiu stipendanto ricevos krome
por la restaddaŭro 100 aŭstrajn

ŝilingojn kiel poŝmonon kaj
kelkajn aliajn favoraĵojn.


Tiu-ĉi informo estas nur provizora
kaj neniu aspiru je stipendio antaŭ
oficiala komuniko.

La aŭstra Esperantokongreso
akceptis la sciigon pri la kreo de la
Fondaĵo kun aplaŭdego kaj varma
danko al la fondinto, al kiu danko
certe aliĝos ankaŭ la Esperantistaro
de la tuta mondo.

Alfred Berdan (V'ieno)
kuratora komitatano.

RADIO - ELSEDOJ EN ESPERANTO

1954



ENTUTE 20 STACIOJ

La feruojistoj kongresis, *fino*

programon apenaŭ superigeblan. Dancistinoj, popolkantistoj, artistoj, akordionistoj, skeĉoj kaj anoncanto kiu same bone majstris sian fakon, kiel nian lingvon. Vere, LKK pravis, prefere malmulte da amuzaĵoj, sed bonegaj.



Verona situas en pitoreska regiono kaj estas favorata per multaj proksimaj naturbelaĵoj. Dum tuta tago la kongresanaro ŝipveturis sur la Garda-lago kaj alboridiĝis por vidi

ĉarmajn vilaĝojn. Same bona estis la elekto de Venecio por la postkongresa ekskurso, neforgeseblaj horoj en tiu plej bela el ĉiuj urboj. Kvankam la boatekskurso al insuloj Murano kaj Burano estis interesa, la unua pro la vitro-artindustrio, la alia kiel tipa itala fiŝista vilaĝo, kelkaj estus preferintaj vidi pli funde Venecion.

Resume, vere ĝojiga kongreso, kiu pro granda partoprenantaro, saĝaj decidoj, ravaj ekskursoj, restas en plej bona memoro al ĉiuj partoprenintoj.

KIAMANIERE ONI LERNAS ESPERANTON ?

Laŭ la enketo farita en la jaro 1953 de la Centro de Esploro kaj Dokumentado en Londono la Internacia Lingvo estas lernata laŭ jenaj manieroj:

 Kiel familia lingvo	 En kursoj	 En lernejoj	 Memlernantoj
 4.2 %	 54.2 %	 1.6 %	 40 %

 Ĉiu simbolo reprezentas 10 %

Proksima Oriento vokas, *fino*

la komisiono, ne gravas nacieco, aĝo nek sekso. Gravas, ke la persono bone parolu la lingvon, kapablu fari paroladon aŭ instrui (precipe per rekta metodo), ke li havu organizan kapablon, aŭ ke li sciu fari helpajn laborojn en tiuj fakoj. Iu ajn aldona kvalito estas bonvena. Krome, kiel jam dirite, estas necesa la materiala respondeco pri sia vivtenado, kaj ne havu pasportajn malfacilaĵojn.


Estas mia deziro renkontiĝi kun la kandidatoj dum la kongreso en Haarlem, kie ni faros specialan kunvenon por paroli pri tiu ĉi afero. Korespondaĵojn provizore bonvolu

direkti al la Centra Oficejo de UEA (Heronsgate) kun klara indiko "Por A.P.O."

La vojaĝo komenciĝos proksimume komence de 1955, kaj se iu kunlaboranto disponas nur pri limigita tempo, li povas partopreni ankaŭ dum nur parto de la Agado.

Multaj landoj ankoraŭ ekzistas, kie ne ekplugis niaj plugiloj, kaj kie la etnikaj kaj aliaj cirkonstancoj permesas antaŭvidi bonan rikolton. Alvenis la vico de la Proksima Oriento, por eksemi la semojn de Esperanto. Ĝia virgeco, kaj la foresto de la verda stelo el tiuj landoj, nin vokas al la devo.

EVOLUO DE LA INTERNACIA LINGVO



1 arbradiko reprezentas 500 lingvajn radikojn.
 1 arbfolio " 500 vortojn.

Alvoko al niaj artistoj Honora Konkurso

Konvena propono pri belarta statuo, kiu dekoru novan Esperanto-placon en la sveda havenurbo Gotenburgo, estas serĉata. La placo, unua Esperantoplace en Skandinavio, situas en moderna kaj vigle trafikata urboparto.

Per tiu ĉi alvoko ni turnas nin al ĉiu kapabla artdesegnisto kaj skulptisto petante pri helpo. Helpu nin per via ideo, sugesto aŭ pozitiva projekto kiel eble plej efektive ornamu tiun placon.


La statuo esence simboligu la universalecon de Esperanto, sed ankaŭ estu alloga el estetika vidpunkto.

La tuta materialo estos ekspozicie prezentata kaj de fakuloj juĝata. La venkinta projekto por ĉiam honoros la artiston.

Por ke ankaŭ neeŭropanoj povu partopreni ni fiksas la konkurstemon ĝis la fino de decembro 1954. Materialon sendu al :

Esperanto-Statuo,
Box 11035, Göteborg 11,
Svedlando.

Enigma Konkurso N-ro 90



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj :

N-ro 201 : Rekomendo kondukas al plendo. antaŭmetu : ar, re, ek, ko, am, ve, an, ad, ro, ak, po, in, ad, bu, ak, va, es, ma, pl, ep, kl, te, in, ad, po.

N-ro 202 : Horizontale : ĥemi-puniofta, etudunikfier, muzenizotent, ideoikonarta, lakinetaalko, anodezokleon, korotostkonk, idolaktoonkl, ladagaloosto, avaralozstal, dato-lobotani, arogozonoliv.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 86-a konkurso : S-ro V. Marcone (Ital) 131, S-ro J. Derieuw (Belg) 130, S-ro J. Escare (Franc) 129 p.

Enigmo N-ro 205 : La vortoj de kvin esprimoj el la Proverbaro de D-ro Zamenhof intermiksiĝis. Mi donas ilin en alfabeto sinsekvo. Bonvolu reordigi ilin. batas-dekstra-eĉ - en - eraro - estas - faras - faro - favoras - hela - hontu - hontu - kion - kiun - koko - la - la - lumas - malbela - maldekstra - mano - ne - ne - ovoporta - penti - persisti - plej - por - post - pri - ricevas - sciu - servantoj - sin - sinjoroj - sorto - suno - tiu - vetero - via - vundojn.

Enigmo N-ro 206 : Ĉi sube sekvas 34 malgrandaj vortoj kaj la klarigoj de 34 grandaj vortoj. Se vi povas trovi la grandajn vortojn el la klarigoj, kiujn mi donis, kaj vi deprenas de ĉiu trovita vorto la literojn de la samnumeraj malgrandaj vortoj, vi povas formi el la restantaj literoj 34 novajn

malgrandajn vortojn. Mi ankoraŭ aldonas, ke tiel la komencliteroj de la grandaj vortoj kiel tiuj de la novaj malgrandaj vortoj formas konatan esprimon. 1. morto, 2. tezo, 3. urno, 4. turo, 5. bati, 6. reto, 7. erari, 8. limo, 9. brano, 10. lito, 11. cedi, 12. kanto, 13. volo, 14. identa, 15. gardi, 16. paki, 17. aresti, 18. pri, 19. iri, 20. ago, 21. maro, 22. ies, 23. mi, 24. sola, 25. mil, 26. tinko, 27. kero, 28. io, 29. celo, 30. kara, 31. ĝeni, 32. turo, 33. arbaro, 34. kisi. 1. mezurunuo de longo ; 2. havanta la saman meznombran temperaturon ; 3. enloĝantino de granda loko ; 4. parto de strato rezervata por piedirantoj ; 5. aparato por ebenigi lignon ; 6. ventodirekto ; 7. estrarano ; 8. surtegmenta fako de veturilo ; 9. proksimulo ; 10. ĝenerala agmaniero ; 11. tuto de tiuj kiuj kompilas gazeton ; 12. malfeliĉa okazo ; 13. muzikinstrumento ; 14. celanta liberigon de la tuta nacia teritorio ; 15. impone granda ; 16. taga rabobirdo ; 17. kuracado de malsanoj per sero ; 18. ekstreme varmega ; 19. moka dirmaniero ; 20. fortega ventego ; 21. batalanto en virbova ludo ; 22. lakteca fluaĵo, kiun oni eltiras el olehavaj grajnoj ; 23. mirindega faritaĵo ; 24. akceptinta prirespondecon pri la agoj de iu alia ; 25. ekpuŝo de fizika forto, kiu ekmovas ion ; 26. sensentiga drogo ; 27. rostita bruniĝinta sukero ; 28. neefektivebla idealo ; 29. tio, kion instru-

fino sur paĝo 221

Belarta Konkurso 1953 :

Prozo Originala

Zeljko Takač :

6a Premio

Mensog' Nia Ĉiutaga

MALLONGA, surdiga lokomotiv-fajfo, kaj la vagonaro moviĝis. La vagono en kiu mi troviĝis estis plenplena, verŝajne ne iom malpli ol aliaj el kiuj konsistis nia trajno. Valizoj, kofroj kaj pakaĵoj kuŝis ĉie sur la oleumita planko, ĝenante nin ĉe ĉiu movo, ĉar eĉ por pasaĝeroj estis tre malmulte da spaco en sufoko de kupeoj kaj en mallarĝaj koridoroj. Ekstere komencis vesperiĝi kaj en la malhelo de la vagono moviĝis homoj serĉantaj sian eluzitan kofron aŭ perditan kunvojaĝanton. Ie post la koridorangulo oni disputis pri fermo aŭ malfermo de fenestro, ĉar la estiĝonta trablovo povas kaŭzi ĝenan dentodoloron—almenaŭ tiel konvinke volis pruvi ia virina voĉo. Apud mi staranta geedza paro ĵus finis panikece komencitan jam trifojan tranombradon de siaj multnombraj pakaĵetoj kaj saketoj.

Mi sukcesis kapti relative tre oportunan starlokon ĉe la fenestro, apoginte min perdorse sur la kupean pordon. La trajno jam plirapidis, kaj mi rigardis kiel en malproksimo malaperas stacidoma perono kun adiaŭantaj homoj, starantaj sub forta lumo de nun ekfunkciiginta brilo de elektra ampolo. La homoj sur la perono ankoraŭ mansvingis salutante forvojaĝanton kiu nek plu rigardis nek povis distingi la personon kiu salutas lin.

“Do, kara mia, finiĝas la tria festotago, kaj morgaŭ denove frumatene al la laboro. Tamen vi

agrabile ilin pasigis”, mi diris al mi mem, rigardante melankolie malaperon de nokta urbeto silueto en kiu mi dum jaroj vivis. En ĝi mi havis amikojn, kaj mi konis ĉiun homon. Kun la malgranda provinca urbo en pitoreska ĉirkaŭaĵo ligas min la plej karaj memoroj de miaj knab- kaj junulaĝo, kiam mi ĝuis en senzorgaj dumsomeraj libertempoj, kie mi sentis sekreton pri la unua amo el tempo de gimnazio. Antaŭ pli ol kvar jaroj mi forlasis kun miaj gepatroj la urbon. Kvankam min tentis la deziro viziti eĉ ankoraŭ pli frue la urbon, mi ne faris tion. Kial? Mi mem ne scias. Eble pro tempomanko, okupiteco aŭ ia hezitema sento de malkuraĝo.

Dum tri tagoj mi soife ensorbis en la cerbon ĉiun amikon, domon aŭ okazintaĵon kiu min ligas kun mia juneco. Sed paso de tempo multon faris eĉ dum mallonga tempoperiodo de kvar jaroj. Kelkaj el konatoj mortis, novaj personoj venis en la urbon. Tamen multo ŝanĝiĝis! Miaj lernejoj amikoj promenante kun sia familio fondita jam antaŭ kvar-kvin jaroj salutas min afable, sed tamen multe pli alie, pli seriozece, pli plenkreskule ol mi iam povis supozi. Amikoj kun kiuj mi piedpilkludis aŭ kiu de mi ŝtelrigarde transskribis matematikan taskon dum profesoro “severe” promenis tra la klaso, ne plu havas tempon por la amika interparolo. “Kial ili estas tiaj? Ĉu homo ne povas resti dum la vivo sincera infano? Kial miaj amikoj surmetis

la maskon por kaŝi gajan knabecan bonhumoron el sia juneco? Kial? Kie estas la kaŭzo?" ... Tiaj pensoj kaj demandoj flugis en mia kapo jam de la unua tago post reveno en la urbon. Meditante pri tio en mia interno subite kreskis turmenta demando: "Ĉu mi ankaŭ estas la sama? Ĉu mi dum tiu tempo ŝanĝiĝis aŭ la tempopaso min ne tuŝis?" Starante en plenŝtopita vagona koridoro mi meditis pri tio serĉante la respondon kaj kaŭzon, dum en mia konscio pli kaj pli aperis kvazaŭ noktaj fantomoj el tomboj de memoroj, du renkontoj kiuj al mi donis la pravan respondon. Du okazaĵoj, du personoj kiujn mi renkontis dum tiuj tagoj, donis al mi respondon ne eldiritan sed tamen aŭdeblan.

Mia maljuna instruisto el popollernejo, kiun mi ne vidis dum ses jaroj, tre surpriziĝis kiam mi vizitis lin. Jam tute maljuniĝinta kaj malforta pro la antaŭnelonge pasinta malsano li ripozis en sia ĝardeno, sidante en la apogseĝo. La ĝardeno kiu iam estis modele prizorgata nun tre malgaje aspektis. La instruisto estis profunde kortuŝita per mia vizito, ĉar lin vizitas nur lia najbaro kiu tiam kun li diskutis pri filatelaĵoj, kvankam ili ambaŭ jam de longe ne kolektas la poŝtmarkojn. Tre ĝoja pro mia atento kaj feliĉa ĉar mi vizitis lin. Amika estis nia interparolo en kiu ni revivigis memorojn el la tempo de popollernejo. Longe li parolis pri siaj lernantoj, pri sia instruista vivo, pri malalta pensio, kaj pri aliaj siaj problemoj.

Ĉu mi povis al li, kiu nun kun larmoj en la okuloj adiaŭis de mi, sincere respondi al la demando pri la stato de miaj studoj kaj pri mia persona, interna konsolidigo? Ĉu

mi povis seniluziigi lin kaj detrui lian bonan opinion pri mi, kiun li havis ankoraŭ, kiam mi estis lia lernanto. Kvankam kun interna riproĉo, mi tamen mensogis al mia instruisto, farante en liaj okuloj la imagatan bildon pri mi pli hela, pli valora ...

Jes, post feraj reloj en la provinca urbeto restis la maljuna pensiita instruisto, kiu kun larmoj eldiris "Ĝis revido!" eĉ ne supozante, ke li konservas pri mi tute falsan imagon.

Pitoreska ĉirkaŭaĵo, dum somero agrabla banloko apud la proksima preterfluanta rivero, malnova urba parko, ĉion ĉi donas al hazarde alveninta turisto apartan ĉarmon, sed mortige enuigaj estas la momentoj kiam homo volas ion pli, ion por satigi sian intelektan bezonon. Tiam al li en tiu provinca urbeto restas nenio alia, ol solece mediti aŭ edziĝi.

Krom la kinejo, kelkaj drinkejoj, kie ebriuloj kantas pri sveltaj knabin-kruroj, ne ekzistas aliaj amuzejoj. La sola loko, kie oni povas iom distriĝi per la kantado de iu triaranga barkantistino kaj ekdanci ekzotikan "sambo"-n aŭ Vienen valson estis la urba hotelo, plena de homoj, trinkantaj varman bieron. La neventumita aero estis plena de turbulenta cigaredfumo. Tio estis mia lasta vespero en la urbeto kaj veninte en la hotelsalonon mi ĉirkaŭrigardis, esperante ie ajn trovi neokupitan sidlokon. Sed ĉio estis okupita, kaj kiam mi volis rezignante jam foriri, mi aŭdis, ke virina voĉo vokas min: "Venu ĉe mi! Ĉi tie estas libera unu seĝo!"

En la kapo turniĝis memoroj, personoj kaj okazaĵoj, sed mi ne kapablis diveni al kiu el miaj konatinoj devus aparteni ĉi ĉarma fraŭlino, kiu svingante per la mano vokis min al sia tablo: "Nu, najbaro,

ĉu vi min ne plu konas? Ĉu vi tute forgesis min?" Apenaŭ post la vorto "najbaro" mi subite komprenis, ke antaŭ mi troviĝas mia najbarino, kiun mi ne vidis jam preskaŭ kvin jarojn, kiam ŝi ankoraŭ estis knabineto el tria klaso de gimnazio kaj mi ne volis resaluti ŝian kvietan kaj modestan "bonan vesperon". Ja, jaroj pasis kaj la fluo de la tempo faris, ke nun antaŭ mi sidas ĉarma juna virino, kiu per sincere ĝojo diris: "Saluton, Zeljko!" Kvankam mi ankoraŭ ne kredis, ke tiu alta kaj elegante vestita juna damo, fumanta cigaredon, kun belstatura korpo kaj ore blonda hararo, estas mia iama najbarineto, kiu dum la somero nudpieda kuris en la ĝardeno. Mi tamen altabliĝis komencante la interparolon. Longe kaj detale mi devis rakonti pri miaj vojaĝoj eksterlande kaj tiam ŝi diris: "Jes, dankon pro la bildkarta saluto, kiun vi antaŭ tri jaroj sendis al mi el eksterlando. Mi ankoraŭ hodiaŭ gardas ĝin, kaj tiam dum tiuj tagoj mi estis la plej feliĉa, kaj mi fiere montris ĝin al ĉiuj, dirante, ke vi tamen memoras pri via amikineto". Ŝi rigardis min scivoleme, kaj mi parolis, mensogis kaj elpensis la plej interesajn detalojn, nur ke mi satigu ŝian grandan kuriozemon. Nun mi konsciis, ke temas pri mia prestiĝo en ŝiaj okuloj, ke temas pri tio, ke mi konservu imagitan bildon pri la homo, kiu konas eksterlandon kvazaŭ sian poŝon. Mi daŭrigis la rakontadon kun la espero, ke tamen en ies opinio mi ŝajnas grava persono kaj ne malriĉa studento kaj malaltgrada oficisto.

Starante en la plena vagono nun mi meditis pri la fraŭlino, kiu akompanis min al la stacidomo kaj mansvingante salutis min. Mi rigardis ŝin kaj dum la vagonradoj misharmonie batis


super la preterpasantaj relkruciĝoj, mi pensis, ke mi estas malĝoja. La salutoj de ĉarma juna virino, la mansvingo ne estis direktataj al mi, sed al iu ne ekzistanta Zeljko, kiu konas la mondon kvazaŭ sian poŝon, kiu ne havas materiajn zorgojn kaj por kiu ne ekzistas problemoj. Kvankam mi iom hontis kaj riproĉis al mi mem pro la kreo de tiu alia Zeljko, mi tamen en la profundo de la koro estis kontenta, ĉar mi sciis—se mi eĉ ne tiom ete mensogis, certe neniu akompanus min de la stacidomo en provinca urbeto.

Malaperis jam la lastaj domoj de la antaŭurbo antaŭ kiuj senzorge sidis iliaj posedantoj, parolante pri la morgaŭa labortago. En la vagono regis malhelo, densa kvazaŭ inko. Mi sentis, ke mi ruĝiĝas pro la faritaj mensogoj kaj mi sciis, ke ie en la urbo, kiu jam ne plu estis videbla, mia pensiita malsana instruisto kaj svelta juna najbarino havas pri mi tute malpravan, pli valoran kaj pli signifan imagon, ol mi vere estas. "Kial mi mensogis? Ĉu estis bezone? Ĉu tiaj malgrandaj mensogoj ĉiutagaj estas vere tiel firme ligitaj kun la homo? Ĉu oni povus eble tamen ilin eviti?"

Pensoj, memoroj, multaj novaj okazaĵoj kaj impresoj ĥaose flugis en mia konscio kaj tiam unu laca, dormema, eble eĉ iom ebrieta voĉo demandis: "Montru la biletojn, mi petas!"

Enigma Konkurso, *fino*

isto lernigas al lernanto; 30. hebrea prapatro kaj gentestro; 31. teknikisto; 32. akcesoraĵo por ornami; 33. decido pri ia grava malkonsento; 34. tre malmola nekristaligita speco de kvarco.



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo, horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso.

Dimanĉo	10.00–11.00	Hilversum. 298m. Kongresa Diservo (nur 1-VIII). IKOR, 's-Gravelandseweg 55, Hilversum, Ned.
Lundo	12.30–13.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo (nur la unuan mardon de ĉiu monato).
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 25.61m. P. D-ro Baur.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
Merkredo	16.00–16.10	Caramulo. 205m. I. Rádio Polo Norte, Caramulo, Portugalujo.
	17.50–18.10	Roma 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Casella postale 320, Roma, Italujo.
	19.30–19.45	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m., 188m. P. (nur 7-VII, 4-VIII, 1-IX). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.30–07.35	Lille. 218m. I.K. Radiodiffusion Française, Emission Esperanto, 36 Bd. de la Liberté, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	22.50–23.10	Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.50–18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
	21.30–21.45	Guatemala Cd. 470m., 197m., 47m., 30.50m. I. Radio Esperanto, la Voz de Guatemala, Gvatemalo, Mez-Ameriko.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m., 188m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Franca Radio. Dum kelkaj jaroj, la Pariza stacio havigis al ni ĉiutagan programon sur mallonga ondo aŭskultebla longdistance. Ĉi tiu interesa programo bedaŭrinde ĉesis en la jaro 1950. Nun restas nur du matenaj elsendoj per mezlongaj ondoj, kies trafpoŭvo ne estas granda. La kursoj tiel dissendataj tamen estas grava helpo al la disvastigo de Esperanto en Francujo. Ni jam invitis niajn legantojn en la februara numero de la Revuo ebligi per siaj multnombraj leteroj la daŭrigon de la programo de la stacio Lille, kaj esperas, ke tiu alvoko ne estos vana.

Radio Roma. 2-VII, Parolata letero de Prof. Ivo Lapenna ; 7-VII, Novaĵoj el Italujo ; 9-VII, Marco Polo ; 14-VII, Gondoloj kaj kantoj sur la Venecia Laguno ; 16-VII, Madono en la Dia Komedio de Dante ; 21-VII, R. Schwartz, Satiro kaj Humoro en Esperanto ; 23-VII, Prezento de la programo de la 39a U.K. en Haarlem ; 28-VII, Eĥoj de la Florenca Muzika Majo ; 30-VII, Itala belarta urbo Milano.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 262

4-an de Junio 1954

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Majo kaj ankaŭ por komparo je la fino de Majo 1953 :

	1953	1954
Asociaj membroj	4768	6123
Individuaj membroj :		
MJ 711		880
MA 3405		3696
MS 514		688
Patronoj .. 6		7
DM 259		271
HM 58		56
	4953	5598
	9721	11721

DELEGITOJ

Brazilo

Curitiba (Paraná). D : F. J. Soares Portugal, Rua Desembargador Mota 2390. Tel : 2674.

Ihéus (Baia). D : E. Leonardo de Sá, Rua das Flores 53, Caixa Postal 93.

Britujo

Denton (Manchester). FD (Rotario) : N. Williams, 237 Two Trees Lane. Tel : DENton 2384.

Ĉeĥoslovakujo

Liberec. D : vakas.

Danlando

Viborg. VD : S-ino M. Ditzel, Henrik Gernersvej 5. Tel : 1654.
FD (Instruado) : La VD.

Francujo

Arras (Pas de Calais). FD (Veterinaraj aferoj) : R. Monnier, 4 Rue Beffara. Tel : 4.98.

Bourg-de-Péage (Drôme). D : G. Roux, 33 Rue de la République.

Marseille. D : H. Bourdelon, 106 Avenue Joseph Vidal, Marseille VIII.

Orléans. D : P. Delaire, 9-bis Rue du Commandant-de-Poli.

Germanujo

Hagen. FD (Komerco) : W. Rose, Birnbaum 5, Hagen/i.W. Tel : 5521.

Mannheim. D : R. Reuchlin, T 6, 18, Mannheim.

Izraelo

Tel-Aviv. FD (Ĵurnalismo) : O. Berman, 6 Shilo Street.

FD (Vegetarismo) : vakas.

Norvegujo

Tromsø. VD : S. J. Ebeltoft, Ramfjordgt. 1.

Svedujo

Skellefteå. D : vakas.

Strängnäs. D : E. B. Englund, Musikkåren P.3. Tel : 2503.

Svislando

Ennetbaden. FD (Radio) : vakas.

Usono

Bakersfield (Calif.). D : vakas.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1954

660. Bishop, S-ro W. O., London, Anglujo

661. Morris, S-ro W., Birmingham, Anglujo

662. Schulz, S-ro P., Gelsenkirchen, Germanujo

663. Serfass, S-ro F. R., München, Germanujo

664. Babeuf, S-ro M., Fessenheim, Francujo

665. Philippe, S-ro H., Arras, Francujo

666. Larson, S-ino H., Seattle, Wash., Usono

667. Dowling, S-ro D., Glenmore, Irlando

668. Hawley, S-ro T. C., Pretoria, Sud-Afriko

669. Van Dat, S-ro, Port Lyautey, Maroko

670. Nederland, S-ro O., Oksbøl, Danlando

671. Brink, S-ro D. M., Los Angeles, Cal., Usono

672. Maruzzi, D-ro D., Ljubljana, Jugoslavujo

673. Berry, F-ino E., Haslingdon, Anglujo

674. Araujo, S-ro G. S. de, Rio de Janeiro, Brazilo

675. Brandao, S-ino L. de S., Rio de Janeiro, Brazilo

676. Cavaco, S-ro J. G., Rio de Janeiro, Brazilo

677. Costa, S-ro L. J., Santos, Brazilo

678. Freitas, S-ro A. W. de, Rio de Janeiro, Brazilo

679. Gouveia, S-ro R. L., Rio de Janeiro, Brazilo

680. Moreira, S-ro W. M., Belo Horizonte, Brazilo

681. Oliva, S-ro F., Jundiai, S.P., Brazilo

682. Timponi, D-ro M., Rio de Janeiro, Brazilo
 683. Vaz, S-ro A. J., Rio de Janeiro, Brazilo
 684. Viana, S-ro I. L. M., Belo Horizonte, Brazilo
 685. Viana, S-ro J., Belo Horizonte, Brazilo
 686. Ela, S-ro B., Baltimore, Md., Usono
 687. Chapman, S-ro J. L., West Palm Beach, Fla., Usono
 688. Rodrigues, S-ro F. L., Porto, Portugalujo
 689. Himmelstoss, S-ro E., Osnabrück, Germanujo
 690. Leipold, S-ro M., Weiden, Germanujo
 691. Van Hill, S-ro B., Madeira Beach, Fla., Usono
 692. Boeren, S-ro M., Antwerpen, Belgujo
 693. De Mot, S-ro R., Bruxelles, Belgujo
 694. Unchitti, S-ro C. L., Bangkok, Tajlando
 695. Peraire, S-ino F., Pessac, Francujo
 696. Duthilleul, S-ro J., Caen, Francujo
 697. Resberg, S-ro T., Sarpsborg, Norvegujo
 698. Smilga, S-ro K., Toronto, Kanado

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso : F-ino H. Ison 15ŝ., H. Davies 40ŝ., S-ino H. Larson 10ŝ., J. L. Chapman 43ŝ.

DONACOJ al la Fondaĵo Montevideo : L.E.E.N. kaj sekciaro £10 11ŝ., J. V. Holleman 4ŝ. 6p., H. Albers 1ŝ. 9p., F-ino Le Rütte 1ŝ. 9p., Ges. Mabe-soone 38ŝ. 6p., Halifax Esp. Soc. £5, E. Stjernesund 21ŝ., Hannover Esp. Soc. £5, K. Schönrich 8ŝ. 6p., S-ro Müller 1ŝ. 6p., J. Vidack 18ŝ., Yorkshire Esp. Fed. £10 10ŝ., S-ino M. Duncan 20ŝ., L. Heilberg 20ŝ., Johannesburg Esp. Soc. £5, R. De Mot 20ŝ., Esp. Del. en Sicilio 22ŝ. 10p., Como Esp. Gr. 57ŝ. 2p., Bologna Esp. Gr. 27ŝ. 4p., Trieste Esp. As. 26ŝ. 3p., S-ro Filippi 5ŝ. 8p., D-ro A. Baur 32ŝ., S-ino M. Hautmann 8ŝ., Esp. Gr. Parma 57ŝ. 2p., Maroka Esp. As. £8 2ŝ., F. Boyet £2, F-inoj B. kaj J. Vazon £2, L. Chasseriaud 10ŝ., Lyon Esp. Gr. £5, S-ro Martel 10ŝ., Sancoins Esp. Gr. £2, Clermont Ferrand Esp. Gr. 20ŝ., C. L. Unchitti 6ŝ.

Sumo ĝis 31.5.1954 : £913 16ŝ. 1p.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Kun plezuro ni sciigis . . .

“Kia belega lando estas Maroko ; kaj vi povas fieri pri la aktiveco de viaj delegitoj en Nord-Afriko. Mi spertis ilian helpon kaj despli fieris aparteni al nia movado”

Kompreneble ni fieris jam, sed la letero el kiu ni ĉerpis la suprajn vortojn eĉ pli firme konvinkis nin pri la aktiveco kaj helpemo de niaj Marokaj samideanoj. De Londonano ni ricevis raporton pri unu-monata ferio pasigita lastatempe en Maroko, dum kio ŝi faris prelegojn pri vivkondiĉoj en sia lando kaj, pere de Esperanto, havis unikan okazon observi la vivmanieron de la popolo, kaj eklernis pri la streboj de nia Ĉefdelegito, Louis Apcher, kaj liaj kunlaborantoj por progresigi la movadon en tiu ege interesa lando.

CED, *fino*

de plej valoraj Esperanto-verkoj, nun haveblaj. Tiu ĉi listo povas esti sendita nur al publikaj bibliotekoj, kiuj deziras formi Esperanto-fakon.

DONACOJ AL CED

	£	ŝ.	p.
Stato la 5-an de Majo . .	28	19	9
LEEN kaj sekciaro, Nederlando	8	0	0
Sennomulo, Francujo . .	1	0	0
Stato la 31-an de Majo . .	37	19	9

Al ĉiuj donacintoj koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA, Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Britujo, aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34 Rue de Chabrol, Paris X (Francujo), aŭ al CED mem.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidos Dion : Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj.

S-ta Mateo 5. 8-9.

Kultura Esperanto-Domo akceptos laŭeble de junio ĝis septembrofino ĉiulandajn Esperantistojn. Eventuale iam ajn karavanojn. Informpeto sendota kun internacia respondkupono al Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, BAUGE (Maine-et-Loire), Francujo. Represo petata.

Eŭropa Turista Servo, Konijnenperken 109, BOSVOORDE-BRUSSEL, Belgujo. Subtenu, petante turismajn informojn pri eŭropaj vidindaĵoj (1 resp. kup.).

Em. Swedenborg, sveda sciencisto kaj klarvidulo, rivelas en siaj religiaj verkoj la *novan lumon* pri la koncepto de Dio kaj postmorta vivo. Lia filozofio akordigas la religion kun la scienco kaj baziĝas je la spirita senco de S. Biblio. La traktatojn vi ricevos senpage, se eble, kontraŭ 1 resp. kup. ĉe : Jan B. Vlach, Lužická 21, PRAHA XII, Ĉeĥoslovakujo.

Ĉiun somerferion ekde 1955 (7 semajnojn) okazos internacia infanferiejo. Kiu pretas helpi gvidi kaj enkonduki Esperanton? Petu informojn al G. Cool, 1e Brandenburgerweg 13, DE BILT, Nederlando.

Amikan korespondadon kun gejunuloj de ĉiuj landoj deziras S-ro Erich Zimmerschitt, Darmstädter-Str. 59, DARMSTADT-EBERSTADT, Germanujo.

Kongresanoj, vizitu Belgion. Ĉambroj ekde 50 fr. por persono. Belga Turista Servo, Konijnenperken 109, Bosvoorde, BRUSELO, Belgujo. Tel : 48.44.36.

Esperantistoj tutmonde. Bonvolu pravi solidarecon. Por ekspozicio okaze de jubileanta popollernejo sendu ĉiun ajn esperantistaĵon kun gratulo. Subtenu jubileantan instruiston, kiu dudek jarojn luktis por nia komuna idealo. Filatele afranku. Esperantista rekompenco garantiata. Robert Loeckx, Konijnenperken 109, Bosvoorde, BRUSELO, Belgujo.

Sveda 35-jara kontoristino deziras amike korespondi kun eksterlando, precipe pri vojaĝoj, landoj, popoloj. pm.—ne ! p.i.—jes ! S-ino Lilly Linnarsson, Vänskapsvägen 38, Stora Essingen (STOCKHOLM), Svedujo.

300 div. germ. pm. mi sendos kontraŭ 200 div. el vialando. Friedrich Herbst, Friedrichstr. 10-I, HELMSTEDT, Germanujo.

Kiu angla, sveda, nederlanda aŭ hispana samideano invitas min pasigi 3–5 semajnojn ĉe sia familio ? Li poste estos mia gasto en Svislando. Mi estas 19-jara studanto, granda amiko de la naturo kaj de la diversaj eŭropaj kulturoj. Hans Traber, Im Hegiberg, NIEDERHELFENSCHWIL, St. G., Svislando.

Tutmondo ! Bonvolu sendi Esperantaĵojn, korespondaĵojn por mia ekspozicio. Ĉiu estos rekompencata per memoraĵo. José Pauluk, 15 de Novembro 551, IRATI, Paraná, Brazilo.

Esperanto-vegetaranoj en Izraelo intencas renovigi la revuon *Vegetarano*. Interesuloj skribu al Zamenhof-Fondo, P.K. 804, JERUSALEM, Izraelo.

Deziras korespondi kun ekster-eŭropanoj G. Sorad, R. Končara 26, SUBOTICA, Jugoslavujo.

Havigu al vi tuj je malaltigita prezo

D-ro Adolf Halbedl

PAPO PIO X BEATA

(Sanktuligita la 29-5-54)

112 p. kun pluraj bildoj

Prezo : Ital. L.300 (5 rpk.) (4ŝ. 6p.)

“La esperantistoj ŝuldas al li specialan dankon, ĉar li dum tempo—estis jam en la jaro 1906 !—estis por Esperanto, kiam multaj ‘seriozuloj’ Esperanton ankoraŭ rigardis kiel fantaziaĵo. La Papo kuraĝis diri : **Esperanto havas grandan estontecon.**” *Esperanto.*

Elio Migliorini

ESPERANTA LEGOLIBRO

188 p., broŝ., Ital. L.380 (5ŝ.)
elegante bindita L.580 (7ŝ. 6p.)

**Tra la vivo Tra la lingvo
Tra la literaturo**

Tre taŭga por
memperfektiĝo kaj por superaj kursoj.

Mendu ĉe

A. Paolet, S. Vito al Tagliamento, Italujo
aŭ ĉe **Universala Esperanto-Asocio**

La “Epoko” Libroj

Romanoj taŭgaj por la distra horo, klare presitaj, kartone binditaj
N-roj 2–6 po 2 ŝil. (6 rpk.)—N-roj 7–11 po 4 ŝil. (12 rpk.)

1. **Tute elĉerpita.**
2. **La Knaboj de Paŭlo-Strato.** F. Molnár. El la Hungara L. Spierer. 188 paĝoj—Alloga rakonto pri knabaj “bataloj”.
3. **La Princo kaj Betty.** P. G. Wodehouse. El la Angla G. Badash. 188 paĝoj—La konata Angla humoristo rakontas
4. **La Tempo-Maŝino : Lando de la Blinduloj.** H. G. Wells. El la Angla E. W. Amos. 188 paĝoj—Spertoj pere de la tempa fervojo.
5. **Princino de Marso.** E. Rice Burroughs. El la Angla K. R. C. Sturmer. 190 paĝoj—Aventuroj sur alia planedo.
6. **Colomba.** Prosper Merimée. El la Franca J. Beau. 188 paĝoj—Pri Korsikaj interfamiliaj kvereloj.
7. **Sep Vangofrapoj.** Karlo Aszlányi. El la Hungara L. Spierer. 156 paĝoj—Kiel maldungito venĝis sin.
8. **La Virineto en Bluo** kaj aliaj rakontoj. Originale verkis M. Stuttard. 150 paĝoj—Seriozaj kaj amuzaj rakontoj.
9. **Brulanta Sekreto** kaj aliaj rakontoj. Stefan Zweig. El la Germana K. R. kaj P. E. Schwerin. 160 paĝoj—Psikologiaj kaj aliaj rakontoj.
10. **Kiso de la Reĝino.** I. F. Naĵivin. El la Rusa D. Staritsky. 188 paĝoj—Aventuroj en la Belga Kongo.
11. **La Karnavalo kaj la Somnambulino.** K. L. Immermann. El la Germana A. E. Wohlthat. 104 paĝoj—Romantika aventuro malnovstila.

Eldonitaj de :

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD., ANGLUJO

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe :

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo